

KATALUNA ESPERANTISTO

Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 372 (núm. 4 de la 6a època) DESEMBRE/DECEMBRO 2022

WWW.ESPERANTO.CAT

**Una capçalera amb més
de cent anys d'història**

**Nicolau Dols:
«Mi ne verkas por esprimi miajn sentojn»**

Crònica del congrés de Castelldefels

Lasta agado de KEJ

**33a Kataluna Kongreso de Esperanto:
resumo de la prelegoj**

**XXXIX Congrès Català d'Esperanto:
resum de les ponències**

Redaktora saluto.....	3
39a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO. RESUMO DE LA PRELEGOJ / XXXIX CONGRÉS CATALÀ D'ESPERANTO. RESUM DE LES PONÈNCIES	
Lingva aritmetiko: ĉu subtrahi aŭ adicii?	4
La filipina lingvo: krizo pri identeco?	6
La Vikipèdia i el 39è Congrès Català d'Esperanto	7
“Do you parolas Esperanton?”	8
Ĉu vi parolas eksperanton?	10
Ramón Fernández Jurado.....	11
L'estandardització alimentària com a promotora de l'erosió genètica i lingüística	12
Survoje al formorto (kaj kion fari pri tio)	14
Josep Maria Jujol, ĉu ekologiisma artist-arkitekto?	15
LITERATURO/LITERATURA	
Ĉu ĉefverkoj aŭ antologioj aŭ surstrataj prezentoj?.....	17
Kataluna skolo	19
Poezia angulo. En centjariĝo de forpaso de Miquel Costa i Llobera.....	21
Víctor Català torna a l'esperanto	22
LLENGÜES/LINGVOJ	
Del so a la lletra, de Delfi Dalmau	23
Komprenebla esperanto	25
HISTORIA MEMORAĴO / MEMÒRIA HISTÒRICA	
Kataluna Esperantisto: una capçalera amb més de cent anys d'història.....	26
100 jarojn antaŭe la Barcelona Specimena Foiro invitis KEF partopreni	27
INTERVJUO / ENTREVISTA	
Nicolau Dols: «Mi ne verkas por esprimi miajn sentojn»	28
ATESTO / TESTIMONI	
L'Estaquirot.....	31
El llegat de la fraternitat universal.....	33
ANGULO POR ETERNAJ KOMENCANTOJ	
Krucvortenigmo: adjektivoj.....	34
ASOCIA AGADO / LES NOSTRES ENTITATS	
Asocia agado de KEA.....	35
Crònica del congrés de Castelldefels.....	36
Lasta agado de KEJ.....	38
VILAĜO ESPERANTO	
Sindonema vilaĝo	43

Kataluna Esperantisto és una publicació semestral en català i esperanto de l'Associació Catalana d'Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l'esperanto i de les llengües planificades.

Edita: Associació Catalana d'Esperanto
Apartat 1008 - 08204 Sabadell
Papa Pius XI, 130 - 08208 Sabadell
www.esperanto.cat
info@esperanto.cat

Consell de redacció: Elisabet Abeyà, Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Pere Fornells, Xavier Margais, Pedro Martín Burutxaga, Òscar Puig, Alfons Tur, Carles Vela, Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Hèctor Alòs (esperanto), Assumpta Mascaró (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l'edició en paper: 2014-8364

ISSN de l'edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO
KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

President/Prezidanto: Òscar Puig
Vicepresidenta /Vicprezidanto: Sandra Vives,
Secretària/Sekretario: Maria Sánchez,
Tresorera/Kasisto: Clara Casanovas -
Vocals/Voĉdonantoj: Sebastià Ribes,
Ferriol Macip, Mon Cardona, Carles Vela,
Enric Pineda, Alfons Tur, Representant/
Reprezentanto de KEJ: Jordi Calafi

JOVENTUT CATALANA D'ESPERANTO/
KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO

President/Prezidanto: Jordi Calafi,
Vicepresidenta - Vicprezidanto: Siru Laine,
2n Vicepresident /2a Vicprezidanto: David Ruiz, Tresorer/Kasisto: Pol Jiménez,
Secretari General/Ĝenerala Sekretario:
Jordi Solsona, Representant a TEJO/
Komitatano-A en TEJO: Òscar Hernández,
Xarxes socials / Sociaj retejoj: Lucía M. Fernández.

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto esprimas opiniojn de la eldonisto KEA. Els autors que signen els articles són els responsables dels seus continguts. L'opinió de KEA només s'expressa a través de l'editorial

Tots els articles estan subjectes a llicència Creative Commons Reconeixement-NoComercial-SenseObraDerivada 2.5 (<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.5/es/legalcode.ca>). Està permès de reproduir-los i distribuir-los, sempre que es faci sense afany de lucre i se'n reconegui explícitament els autors, i l'Associació Catalana d'Esperanto com a editora

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6
08004 Barcelona



REDAKTORA SALUTO

Per a aquest número de la revista hem demanat a tots els ponents del XXXIX congrés que ens facin un resum, amb les seves paraules, del contingut de la seva intervenció. Gairebé tots s'han prestat a aquesta col·laboració i ens han enviat amablement els seus escrits on han fet l'esforç d'abreujar tot el que tenien per dir-nos. Pensem que aquest monogràfic pot servir de record a tots els assistents al congrés i que també pot ser com un tast del seu contingut per als qui no hi varen assistir. Hem posat els resums en l'ordre en què els seus autors varen intervenir al congrés i en la llengua en la qual varen fer la ponència. Els donem les gràcies a tots i a la vegada agraïm la col·laboració dels autors de tots els altres articles, dels correctors i del dissenyador gràfic. Sense totes i cadascuna d'aquestes persones no hi hauria revista. Esperem que dins de tota aquesta varietat cada lector hi trobi algun tema del seu interès.

Amb aquest número ens acomiadem com a redactors de *Kataluna Esperantisto* i cedim el pas al company de KEA Pere Fornells, a qui desitgem que frueixi amb aquesta tasca. Estem contents d'haver contribuït a omplir el buit que va deixar Montserrat Franquesa i així haver donat continuïtat durant l'any 2022 a aquesta revista centenària. Ens veurem a Esperantujo!

Por ĉi tiu numero de la revuo, ni petis al ĉiuj prelegantoj de la 39a kongreso, ke ili faru resumon, per siaj propraj vortoj, de la enhavo de sia parolado. Preskaŭ ĉiuj akceptis kunlabori kaj afable sendis al ni siajn skribaĵojn, kie ili klopodis mallonge esprimi ĉion, kion ili devis diri al ni. Ni opinias, ke tiu ĉi monografio utilos kiel memoraĵo por ĉiuj, kiuj ĉeestis la kongreson, kaj ke ĝi ankaŭ povos esti specimeno de ĝia enhavo por tiuj, kiuj ne ĉeestis. Ni metis la resumojn en la ordon en kiu iliaj aŭtoroj parolis en la kongreso kaj en la lingvo en kiu ili faris sian prelegon. Ni dankas ĉiujn kaj samtempe ni dankas la kunlaboron de la aŭtoroj de ĉiuj aliaj artikoloj, de la provlegantoj kaj de la grafikisto. Sen ĉiuj tiuj homoj ne ekzistus revuo. Ni esperas, ke ene de ĉi tiu diverseco ĉiu leganto trovos interesan temon.

Per tiu ĉi numero ni adiaŭas kiel redaktoroj de *Kataluna Esperantisto* kaj cedas la lokon al KEA-samideano Pere Fornells, kiu, ni esperas, ĝuos ĉi tiun taskon. Ni ĝojas, ke ni kontribuis plenigi la malplenan lasitan de Montserrat Franquesa kaj tiel daŭrigi dum la jaro 2022 tiun centjaran revuon. Ĝis revido en Esperantujo!

Elisabet Abeyà Lafontana kaj Xavier Margais Basi



SIRO_RODENAS/SHUTTERSTOCK.COM

FOTO DE LA PORTADA

Castelldefels té a tocar un dels espais d'especial interès natural més bonics que hi ha, el Delta del Llobregat, que sobreviu a ambdós costats de les pistes d'aterratge de l'aeroport. Compta però, amb un espai natural propi, l'Olla del Rei, un espai que serveix d'aturada a molts ocells migratoris i que acull diverses espècies de fauna ben diversa.

FOTO DE LA KOVRILO

Castelldefels apudas al belega areo de aparta natura valoro, la Lobregata riverdelto kiu pluvivas ambaŭflanke de la kurejoj de la flughaveno. Ĝi entenas tamen, tute aparta natura areo, "Olla del Rei (pr. Olja del rej)", esperante 'Reĝa kaldrono', areo kiu taŭgas kiel portempa haltejo al amaso de migrantaj birdoj kaj kiu akceptas tre malsimilajn speciojn de faŭno.

LINGVA ARITMETIKO: ĈU SUBTRAHI AŬ ADICII?

Nicolau Dols

lingvisto kaj poeto



Verŝajne oni povas pensi ke instruado aŭ lernado de lingvoj ĉiam samas, kaj homoj lernas laŭplaĉe aŭ pro simpla emo koni novajn kodojn aŭ socion. La vero, tamen, ne ĉiam estas tiel simpla. La tempo kiam ĉiu gento havis propran teritorion kie nur unu lingvo estis uzata, se ĝi entute iam ekzistis, jam delonge forpasis.

La kresko de la loĝantaro de la Baleara Insularo (B. I.) estas unu el la plej fortaj en Eŭropo. Eble sufiĉas konstati ke tie oni pasis el 443 327 loĝantoj en 1960 al 1 173 008 en 2021. Tio signifas ke la nuna loĝantaro estas 264,6% kompare al la loĝantaro de 1960. Jen la ciferoj:

1960	443 327
1970	558 287
1981	685 088
1991	709 138
2001	841 669
2011	1 100 503
2021	1 173 008

Kompreneble, tio ne estas la rezulto de natura kresko. Nur enmigrado povas klarigi la nunan situacion. Fakte, la B. I. spertis fortan elmigradon dum la dek-naŭa jarcento kaj la unua duono de la dudeka. Dum la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento la turisma ekspluatado de la marborda teritorio renversis la tendencon.

”

Nuntempe jam malaperis unulingvuloj en la kataluna, sed unulingvuloj en la hispana abundas. Laŭleĝe ambaŭ lingvoj estas oficialaj kaj oni rajtas uzi iun ajn el ili. Tio signifas ke almenaŭ komprenado de la kataluna estas fakte deviga. Kiel povas la eduksistemo elturniĝi en la baleara situacio?



Ene de la eduksistemo la ŝlosilo de la problemo estas la diferenco inter enmergo kaj submergo.

Enmigrintoj kunportas siajn lingvojn. Tiu cirkonstanco forte ŝanĝis la lingvan panoramon de la insuloj, kie la nura komuna kaj sufiĉe disvastigata lingvo estis ĝis la komenco de la turismo erao la kataluna: certe, la hispana estis parolata nur de registaraj oficistoj kaj instruistoj... sed ĝis tiu tempo ĝia instruado ne estis universala. Do ni povas kompari la lingvan situacion de 1960, kiam la plejparto de la loĝantaro estis katalunparolanta kaj subaro de ĝi parolis ankaŭ la hispanan, kun la nuna situacio, kiam 157 lingvoj troveblas sur la baleara teritorio, 25 kun pli ol 1000 parolantoj, kaj 67 kun familia transdonado.

Nuntempe jam malaperis unulingvuloj en la kataluna, sed unulingvuloj en la hispana abundas. Laŭleĝe ambaŭ lingvoj estas oficialaj kaj oni rajtas uzi iun ajn el ili. Tio signifas ke almenaŭ komprenado de la kataluna estas fakte deviga. Kiel povas la eduksistemo elturniĝi en la baleara situacio? 18,78% el la nuna loĝantaro en la B. I. estas fremda, kaj 10,8% naskiĝis en landoj kie la hispana oficialas... sed ne la kataluna.

Aldone, 16,74% de la tuta loĝantaro de la B. I. estas ne fremda, sed naskiĝis en hispanaj regionoj kie oni ne parolas la katalunan. Do, jen la problemo: disvastigi kompetentecon pri la kataluna al la tuta loĝantaro de la insuloj.

Ene de la eduksistemo la ŝlosilo de la problemo estas la diferenco inter enmergo kaj submergo. Oni aplikas lingvoenmergan edukadon kiam la lernanto parolas la plej fortan lingvon (ĉeestantan en la socia medio) kaj ricevas edukadon en la plej malforta (tiu kiun oni povas lerni nur en la lernejo), kaj oni aplikas submergan edukadon kiam la lernanto parolas la plej malfortan lingvon kaj edukado okazas en la plej forta. En tiu lasta situacio nur hejmajn, familiajn lingvotavolojn oni kapablas lerni de la propra lingvo, kaj finfine ĝi iĝas ne utila al profesiaj, sciencaj aŭ oficialaj bezonoj.

Tiusence, instruado en la hispana (atentu: “en la hispana”) en la B. I. kondukas al la malapero de la aliaj lingvoj, kaj instruado en la kataluna kondukas al la malapero de ĉiuj

lingvoj krom la kataluna mem kaj la hispana, ĉar ĉiuj lingvoj de la enmigrintoj (krom la hispana, ankaŭ enmigrinta en la B. I.) estas pli malfortaj en tiu teritorio ol la kataluna. Pro tio, se la celo de la eduksistemo koncerne la lingvojn estas kompetenteco en ambaŭ oficialaj lingvoj, oni devas apliki al la hispanaj unulingvanoj enmergan strategion en la kataluna, neŭtran strategion (instruado en ilia propra lingvo) al denaskaj katalunparolantoj (la medio kaj la hipotezo pri lingva transdonado—Cummins 1981—jam garantias alprenadon de simila lingvo kiel la hispana), kaj alilingvanoj (denaskaj parolantoj de lingvoj ne oficialaj) devus ricevi komencan instruadon kun ioma uzado de siaj propraj lingvoj. Ekzemploj de tiu lasta strategio, kiu plifortigas la memfidon de la lernantoj kaj helpas konstrui pontojn inter kulturaj komunumoj estas abundaj en la bibliografio: Bankston & Zhou (1995) pri la vjetnama en Nov-Orleano, Duarte (2011) pri enmigrintoj en Hamburgo, Basu (2011) pri multkulturismo en Toronto aŭ Airdag (2010) pri turkoj en Flandrio. ■

LA FILIPINA LINGVO: KRIZO PRI IDENTECO?

KURIOZA PRODUKTO DE KOLONIA MEMORO

Albert Stalin Garrido
prezidanto de TEJO



Filipinanoj estas lingve kaj etne diversaj, kun 186 dokumentitaj vivantaj lingvoj parolataj tra pli ol 7000 insuloj. Inter tiuj elstaras la filipina lingvo, oficiala lingvo parolata de pli ol 100 milionoj da homoj rolanta kiel lingva ponto, ĝuste kiel Esperanto. Tamen homoj ne scias pri ĝi, ke ĝi kunhavas kun Esperanto plian trajton: ĝi estas artefarita. Ĝiaj ideo kaj spirito estas artefaritaj: la filipina Konstitucio preskribas, ke ĝi “estu lingva kuniĝo kiu estu plu disvolvata surbaze de filipinaj lingvoj parolataj tra la lando,” kvankam en praktiko tia kuniĝo ne ekzistas kaj ĝi estas la sama afero kiel la tagaloga, parolata en la ĉefurbo Manilo kaj la ĉirkaŭaj regionoj. La plej kurioza afero pri ĝi, tamen, estas ke ĝi spegulas tri jarcentojn de hispana koloniismo kaj duonjarcenton de la usona, ĉar, efektive, ĝi estas amalĝamo, kvankam iom malsama de la intencita: de indiĝenaj, anglaj, kaj hispanaj vortoj kaj konceptoj. Mi esploras la kuriozan (kaj malfacilan) lingvopolitikon de Filipinoj en du temoj:

Temo 1: La influoj de la hispana kaj la angla sur la filipinan, kaj kiel la filipina “aspektas”. Filipinoj estis kolonio de Hispanio ekde 1565 ĝis 1898, kaj tuj poste de Usono ekde 1898 ĝis 1942, kaj denove ekde 1945 ĝis 1946, kiam ĝi finfine gajnis defi-

nitivan sendependiĝon. Ĉu la lando estas vere sendependa politike, lingve, kaj kulture—tio estas alia temo. Hodiaŭ, filipinanoj apenaŭ parolas la hispanan sed tre bone la anglan, pro la kontrastaj lingvopolitikoj de siaj antikvaj mastroj. Ĉiukaze, hispanlingvanoj kaj anglalingvanoj povus tamen kompreni iom, ĉar en aktuala uzo esprimoj el tiuj lingvoj troviĝas ankaŭ en la filipina kun iom da modifo: nomoj de vestaĵoj, manĝiloj, kaj ĉambroj en la domo estas precipe hispandevenaj; nomoj de homoj kaj lokoj kaj diversaj fakaj terminoj estas angladevenaj. Horoj de la tago, tagoj de la semajno, kaj monatoj de la jaro estas esprimitaj aŭ en anglalingvaj aŭ en hispanlingvaj formoj. Sufiĉas diri ke ni ne vere disvolvis indiĝenan vortprovizon kaj lasis la lingvon tia, kia ĝi iĝis. Tio signifas, ke la kolonia pasinteco estas kerna en la filipina identeco.

Temo 2. La efektiva pozicio de la angla (kompare kun la filipina) en Filipinoj. La angla kunhavas kun la filipina agnoskon kiel oficialan lingvon, sed ĝi estas multe pli potenca ol la lasta. Estante la “lingvo de prestiĝo,” lingvokono de la angla estas markilo de socia statuso kaj bona edukado, pro tio la lingvo estas instruata ĉie. Ĉiuj niaj oficialaj dokumentoj—inkluzive de la Konstitucio

kaj individuaj leĝoj—estas en la angla; tiel, oni atestas niajn naskiĝon, civitanan vivon, kaj eventualan morton en ĝi. Edukado estas liverata en la angla kaj apenaŭ en la filipina. La lando iĝis bona fonto de ĉipa laborforto por internaciaj entreprenoj. Ironie kaj maljuste, Filipinoj ne apartenas al tiuj landoj, kiujn monde prestiĝaj universitatoj konsideras “majoritate anglaparolantaj landoj” kaj ĝiajn civitanojn tiuj postulas, ke ili trairu oficialajn lingvoekzamenojn. Evidente, ĝia nerezistebla dependeco de la angla ne estas reciproke profita rilato: la lokaj lingvoj en la lando, inkluzive de la filipina, ne disvolvas proprajn fakajn vortprovizon kaj literaturon kaj ne utilas en sciencaj, leĝaj, muzikaj, ktp. diskutoj.

Klare, tiuj maljustaj lingvopolitikoj devas ŝanĝiĝi aŭ entute ĉesi. Filipinoj, malgraŭ lingvaj kaj kulturaj diferencoj, devas kune agi por aserti la pluvivon de siaj propraj lingvoj kaj identecoj. La filipina registaro devas adopti naciisman, scienceman, kaj popol-orientitan edukadon kiu pliriĉigus ne nur la nacian lingvon, sed ankaŭ ĉiujn 186 vivantajn lingvojn. ■

LA VIQUIPÈDIA I EL 39è CONGRÉS CATALÀ D'ESPERANTO

Lluís de Gibert

zoòleg i viquipedista



El dia d'avui, la Vikipèdia és una de les millors eines per a la difusió del coneixement. Si volem que l'esperanto sigui conegut arreu, és essencial que estigui prou representat a l'*enciclopèdia lliure més gran del món*. Per això és necessari que la comunitat esperantista s'impliqui amb voluntaris i voluntàries que vulguin ampliar els continguts sobre la llengua internacional a la Vikipèdia.

Amb aquesta idea i en l'àmbit del recent congrés de la nostra associació, es van oferir uns tallers introductoris. La proposta es va concretar en un taller per aprendre a editar la Vikipèdia i en una marató d'edició (viquimarató) a partir de la qual començar a millorar els articles ja existents o crear-ne de nous.

A nivell global, el conjunt de la Vikipèdia mundial rep més de 8.000 milions de consultes mensuals —en el cas concret de la Vikipèdia catalana es calculen uns 50 milions de visites cada mes. És prou evident que som moltes les persones que fem servir diàriament la Vikipèdia com a font d'informació i consulta. No obstant això, són molt pocs els lectors i lectors que decideixen fer un pas endavant

i convertir-se en editors i editores d'articles. Així, per exemple, a la Vikipèdia catalana hi ha tan sols uns pocs centenars d'usuàries i usuaris actius, nombre que es redueix a una tercera part en el cas de la Vikipèdia en esperanto.

Les sessions de treball, celebrades durant els primers dies del 39è Congrés, van ser l'inici d'un viquiprojecte perllongat en el temps, el qual avui continua obert i accessible per a tothom qui vulgui participar-hi. El tema central d'aquest viquiprojecte és l'«Esperanto i Catalunya» i els seus principals objectius són ensenyar a editar la Vikipèdia i millorar la qualitat d'alguns dels articles de la Vikipèdia relacionats amb l'esperanto i l'esperantisme a casa nostra.

La participació en els tallers va ser més aviat discreta. Tot i així, es van assolir alguns dels objectius plantejats. Les persones que es van apropar presencialment eren totes novelles pel que fa a l'edició viquipedista, de manera que l'activitat es va centrar en qüestions molt elementals, com ara: resoldre dubtes, respondre preguntes sobre les dinàmiques internes de la Vikipèdia, fer petites edicions, revisar articles, afegir referències, forma-

tar textos, etc. Finalment, amb l'ajuda virtual d'altres usuaris i usuàries més experimentats, es van millorar una desena d'articles, es van crear dos articles nous i es van pujar sis imatges noves.

Crear una enciclopèdia lliure i universal és una aventura emocionant i motivadora, però per a això calen persones voluntàries disposades a invertir-hi part del seu temps. Escriure articles a la Vikipèdia i ajudar a millorar i mantenir els que ja existeixen és molt fàcil. Qualsevol pot fer-ho i ni tan sols és necessari registrar-se com a persona usuària per col·laborar-hi. Només cal conèixer la interfície d'edició i assumir els acords de la comunitat. Seguim! ■

<https://ca.wikipedia.org/w/index.php?title=39KKE>

“DO YOU PAROLAS ESPERANTON?”

LA ANGLA KAJ ESPERANTO KIEL INTERPERSONA
KAJ INTERNACIA LINGVOJ. KOMPARO DE LA EFEKTIVAJ
UZOJ KAJ SUPOZOJ PRI PERSPEKTIVOJ

István Ertl

tradukisto, redaktoro

Jen la pompa titolo sub kiu mi prelegis en la agrablega Kataluna Kongreso, kaj mi estis afable invitita resumi mian prelegon skribe.

Tamen, mi havas malbonan kutimon duoblan: mi apenaŭ preparas skribe miajn prelegojn, kaj mi apenaŭ memoras poste kion mi diris. Tute hontinde.

Mi esperas ke la malmultaj pensoj kaj memoreroj kiuj surfaciĝas nun, monatojn post la kongreso, almenaŭ ne kontraŭdiros la tiaman enhavon.

LOKE, FAKE, PERSONE

(Eble iuj rekonos iamajn rubrik-titolojn de la revuo *Esperanto*..)

Miaj propraj lingvouzaj spertoj pri la lingvoj Esperanto kaj angla estas kondiĉitaj... loke, fake, persone. Kiam de 1992 ĝis 2002 mi laboris profesie, kiel

redaktoro, en la tiam dekelk-kapa skipo de la Centra Oficejo de UEA, Esperanto estis mia ĉiutaga kaj preskaŭ tuttempa lingvo, same en mia laboro kiel private. Mi vivis en kaj per la konvinko ke Esperanto efektive taŭegas, eble plej taŭgas, kiel lingvo interpersona kaj internacia... interhoma.

Dudek jarojn poste, mia konvinko ne ŝanĝiĝis – sed ja mia sperto. Post dekok-monata laborado kiel inform-oficisto en Bruselo, mi ekis kaj pluas kiel tradukisto ĉe institucio de Eŭropa Unio. Nun la angla regas, preskaŭ same monopole kiel pli frue Esperanto, en mia vivo profesia, kaj ofte eĉ privata.

Laŭ tiu sperto, mi emus konkludi ke la angla kaj Esperanto same taŭgas por la menciitaj roloj – kaj ke same taŭgas aliaj lingvoj. Sed nur en la senco ke ĉiu lingvo al kiu ni estas sufiĉe longe kaj intense elmetataj, po-

vas fariĝi nia kompetenta, tutgama komunikilo. Povus esti la franca, la lingala aŭ la korea. Historiaj hazardoj decidas.

Jam en 1997, kiam aperis la libro *English as a Global Language* de David Crystal, leviĝis la demando: ĉu ni jam atingis la punkton de nereveno? Ĉu la angla estas iĝanta, kaj restonta, tuthomara lingvo?

Kvaronan jarcenton poste, la tendenco ja restas tia. (Kaj ni vidu post pliaj 25 jaroj...)

Sed alie statas se ni celas ne la efektivon, sed la potencialon. En tiu senco, ni ĉiuj proprasparte scias ke Esperanto gajnas la pacan batalon: ĝi estas lingvo regula, konsekvenca kaj invita al kreemo, lernebla principe facile (eble malpli facile ol atendate, por homoj kiuj estas malpli kreemaj ol parkeremaj). Per sia neŭtraleco Espe-



ranto devus allogi ankaŭ ideo. Kio mankas al ĝi? (Krom apogaj rimedoj financaj kaj politikaj...)

Mankas tiuj uz-okazoj kies oftigo igus Esperanton same ĉie-ĉeesta kia estas la angla nun: E-parolantaj televidserioj en Netflix, tutdiurnaj novaĵservoj en la lingvo, librovend-ejoj fizike kaj virtuale kun miloj da volumoj... unuvorte, mankas, aŭ apenaŭas, infrastrukturo. Rilate preskaŭ ĉion kio ekzistas en la gravitejo de

la “gravaj” lingvoj, ni povas ja montri ion miniature respondan, ekde kelkcent-ekzempleraj literaturaj revuoj tra porokaza piedpilka teamo ĝis retradioj kaj rokgrupoj ... ĉiam sufiĉe por montri la potencialon, sed preskaŭ neniam sufiĉe por forte altiri lernonton en niajn vicojn. Tiuj kiuj ja varbiĝas estas interesaj, kaj indaj – esceptuloj...

Kaj nun ĉiu leganto finu por si per penso individue optimisma! ■

”

Mankas tiuj uz-okazoj kies oftigo igus Esperanton same ĉie-ĉeesta kia estas la angla nun

ĈU VI PAROLAS EKSPERANTON?

Lluís de Yzaguirre i Maura

Institut de Lingüística Aplicada
Universitat Pompeu Fabra

L'Esperanto neix com una llengua auxiliar que ha de servir de pont entre persones de nacions diferents. Aquest plantejament *auxiliarista* és el que subjau al lema dels esperantistes catalans que em va atraure fa molts anys: *cada poble amb la seva llengua i una llengua per a tots els pobles*. Però ben aviat és feu evident que alguns l'adoptaven pensant que podria arribar a ser l'eina perfecta –per neutral– per a substituir totes les llengües ètniques i acabar amb el multilingüisme, que és vist per gent ignorant com la *maledicció de Babel*. Aquestes dues tendències antagòniques es poden veure confrontant *Et-nismo* amb SAT, *helplingvistoj* vs *anstataŭlingvistoj*.

Des del punt de vista lingüístic, els *helplingvistoj* volen una L² universal, mentre que els *anstataŭlingvistoj* volen que l'esperanto esdevingui l'L¹ de tothom. Així com per als primers la llengua ha de ser senzilla i de fàcil adquisició i assumeixen que la majoria dels parlants l'emprin imperfectament, per als segons ha de ser una llengua completa encara que això impliqui complicar-la amb milers de neologismes no motivats lèxicament que la fan encara més eurocèntrica; una llengua cada cop menys auxiliar, d'on trec el joc de mots per a designar-la com a eks-peranto.

Eugen Wüster és considerat el pare de la terminologia moderna pels mè-

todes de treball de què la va dotar. Aquests mètodes els va desenvolupar com a esperantista mirant de fornir vocabularis tècnics als esperantistes d'una determinada professió que volien no solament poder conversar de la *monda paco*, sinó també intercanviar coneixements professionals. Amb l'implícit subjacent que aquests vocabularis només els interessaven a ells. La llengua comuna seria *fundamenta* i, fora dels especialistes, a ningú li caldria especificar si una *malsanulejo* era un hospital, un dispensari o una clínica.

Fins al 2018 a mi em semblava que l'autèntic esperit congruent amb la *interna ideo* era el dels *helplingvistoj*, però una conferència del doctor Gobbo –que podeu recuperar amb aquest QR– em va assabentar que el



propi Zamenhof va arribar a plantejar-se que l'esperanto fos la llengua comuna (com a L¹) d'un estat sionista creat al cor dels Estats Units d'Amèrica del Nord (minut 16 i següents), descoberta que em va esmicolar la visió maniquea de *helplingvistoj* bons vs *anstataŭlingvistoj* dolents. Com a *kabeinto* però malgrat tot esperantòfon esporàdic, no em deixa indiferent com pugui evolucionar el tema, però se'm fa evident que, si la majoria dels parlants de l'esperanto volen que esdevingui una L¹, estan en el seu dret de provar-ho,



però aconseguiran dissuadir-ne de l'aprenentatge molta gent que podrien haver tingut interès a aprendre una L² en què els seus complements directes sense la postposició -n (sisplau, deixeu de parlar d'acusatiu!) o les seves confusions quasi sempre inòcues entre -b- i -v- no els posin en tensió permanentment.

”

Heu de triar si voleu que l'esperanto sigui l'L¹ d'una minoria o l'L² de tothom


Les llengües ètniques tenen parlants de primera que la tenen com a L¹ i parlants de segona, amb les seves imperfeccions que els igualen entre ells. Heu de triar si voleu que l'esperanto sigui l'L¹ d'una minoria o l'L² de tothom. ■

RAMÓN FERNÁNDEZ JURADO:

MEMORIGANTE LA LABORISTAN AKTIVULON

Xavi Alcalde
politiksciencisto

Ramón Fernández Jurado (Almerio, 1914 - Barcelono, 1986) verkis interesegan membiografion, kiu nur publikiĝis postmorte: *Mèmories d'un militant obrer (1930-1942)*. Temas pri persona rakonto de turnopunktaj eventoj en la vivo de pluraj generacioj de homoj, kadre de milito kaj revolucio. Ĝi ankaŭ elstaras kiel socia historio de la barcelona kvartalo Gràcia, kie loĝis Ramón ekde kiam li aĝas kvar jarojn, kaj kiel socia historio de la loka Esperanto-movado.



La verko komenciĝas per adoleskanta Ramón, laboranta kiel lernanto de meblisto, avida kulturamanto kaj pasia socia batalanto. Ĉar li estis talenta meblisto, li ofte laboris en la domoj de riĉuloj de la kvartalo Putxet; interalie, en tiuj de la (fifama) familio Bertran i Musitu – en unu el ili loĝis la konsulo de (la hitlera) Germanio. Post mallonga periodo kiel ano de la anarkiista sindikato CNT, li aliĝis al Bloc Obrer i Camperol, BOC, heterodoksa komunista politika partio, kiu kontraŭis stalinismon kaj ankaŭ hispanan naciismon. Kaj li partoprenis en strikoj kaj aliaj sociaj agadoj, foje pere de perforto.

Ramón lernis Esperanton en la asocio Paco kaj Amo kaj baldaŭ fariĝis ties prezidanto. Tie li konatiĝis kun Domènec Masachs, individua anarkiisto kaj kohera pacifisto, kiu tre forte influis lin. Iom poste Ramón kunfondis Ateneu Popular de Gràcia kaj ties Esperanto-sekcion, kaj fariĝis ano de Sennacieca Asocio Tutmonda,

SAT. Li kutimis ekskursi kun amikoj, interalie al la tiamnomata Lako Esperanto en la montaro Collserola, kie ili organizis vegetarajn kumanĝojn kun centoj da homoj. Li ankaŭ ĉefrolis en loka kooperativo, kaj kiel oratoro en politikaj mitingoj, kune kun konataj aktivuloj kiel sia amiko (kaj esperantisto) Andreu Nin.

Post la puĉo Ramón alfrontis la ribelajn militistojn en la barcelonaj stratoj flanke de Durruti kaj Ascaso. Tuj poste Ramón partoprenis la militon ene de la revolucia partio POUM, en kiu BOC kunfandiĝis. Li estas tiu kiu unue trovis la kadavron de sia amiko (kaj esperantisto) Miquel Pedrola, estro de lia roto. Ĉar Ramón spertis militan instrukcion, de la komenco li havis respondecan postenon. Li ne misuzis ĝin sed gvidis per ekzemplo. Parte pro tio, li estis vundita sep fojojn – kaj li ĉiam revenis al la fronto. Post unu el ili, lia samĉambrano estis la brita verkisto George Orwell. La

leganto ridetas kiam Ramón rakontas sian flirtadon kun flegistinoj kaj aliaj junulinoj kiujn li renkontis en sia vivo-vojo. Verŝajne la plej grava tiurilate (ĝis lia estonta edzino) estis Aminda Valls, sekretariino de Jaume Miravittles.

La verko finiĝas kun Ramón en la prizono Model, en Barcelono, kie enestis aliaj esperantistoj, kiel Masachs, Delfí Dalmau kaj Francesc Vilà. Ĝi ne pritraktas la ekzilajn jarojn de Ramón en Francio kaj ĉefe Ĉilio, kie ankoraŭ loĝas granda parto de lia familio. Indas memori, ke Ramón estis instruisto pri la kataluna, la hispana kaj Esperanto, kaj ankaŭ poeto en tiuj tri lingvoj. La lastajn jarojn de sia vivo li estis magistratano pri kulturo en Castelldefels, urbo kiu hodiaŭ omaĝas lin diversmaniere. La urba biblioteko nomiĝas laŭ li, estas statuo dediĉita al li en la Placo Esperanto kaj nuntempe oni diskutas la eblon fari lin adopta filo de Castelldefels. ■

L'ESTANDARDITZACIÓ ALIMENTÀRIA COM A PROMOTORA DE L'EROSIÓ GENÈTICA I LINGÜÍSTICA

Joan Casals Missió

Departament d'Enginyeria Agroalimentària i Biotecnologia/Fundació Miquel Agustí,
Campus del Baix Llobregat, Castelldefels

L'agricultura, amb els seus components cultural (tècniques agrícoles) i genètic (espècies i varietats cultivades), i l'idioma són dos components essencials de la identitat de les societats humanes, que han viscut fenòmens co-evolutius des de l'inici de les societats modernes. Originalment l'agricultura prehistòrica es va dispersar conjuntament amb les poblacions, els idiomes i les llavors, generant la base de la diversitat agrícola i lingüística moderna (Diamond and Bellwood, 2003). Inicialment els factors que determinaven l'adaptació agrícola, com el fotoperíode o l'estacionalitat, van determinar les migracions de les primeres cultures agrícoles. Aquestes migracions i, per tant, el moviment d'idiomes i cultius van ser afavorits en l'eix est-oest respecte a l'eix nord-est, preservant-se en aquest segon eix una major diversitat lingüística (2003) i molt proba-

blement també agrícola, tal com assenyalen els fenòmens de domesticació d'algunes espècies importants com la mongeta (*Phaseolus vulgaris*) (Bitocchi et al., 2017) o el tomàquet (*Solanum lycopersicum*) (Blanca et al., 2022). La hipòtesi de la co-dispersió dels idiomes i les societats agrícoles se sustentava en la correlació entre la propagació de la diversitat genètica i la lingüística fora de les zones d'origen de les espècies cultivades, la qual encara s'observa en algunes regions del món, com per exemple a l'Àfrica subsahariana, on s'observa una correlació entre la distribució dels idiomes i els grups genètics de sorgo (*Sorghum bicolor* (L.) Moench) (Westengen et al., 2014). Aquesta co-dispersió era adaptativa, i la relació entre grups etno-lingüístics i diversitat genètica dels cultius era una indicador de la dispersió d'adaptacions socio-ecològiques reeixides. De fet alguns milloradors

de plantes han emprat l'abundància de noms emprats per designar cultivars d'una mateixa espècie com a indicador de diversitat genètica (Brücher, 1989). Posteriorment les revolucions agrícoles de l'època medieval i sobretot de l'època moderna (Revolució Verda) van canviar completament els agrosistemes (Mazoyer and Roudart, 1997), i van provocar fenòmens molt importants d'erosió genètica en els cultius (Esquinas-Alcázar, 2005) i, molt probablement també, d'erosió lingüística. A l'escala local, l'erosió genètica dels cultius ha implicat la pèrdua de nombroses varietats tradicionals, una diversitat que estava representada en la diversitat lingüística, car forçosament es necessitaven noms diferents per designar varietats diferents. Només cal fer una ullada a les col·leccions de varietats tradicionals dels bancs de germoplasma, on es conserva aquesta diversitat genètica, per observar la diversi-



tat de cognoms que tenien els cultius agrícoles (Casals et al., 2020). Com a exemple, en el cas de la col (*Brassica oleracea* L.) antigament trobàvem la col paperina, la brotonera, la setsetmanera, la pota de bou, la borraixona, la del trinxat, la de truc, la del gitano, la de borraïna, la borrugada, la bordenca,

la del nervi, la fuada, la trapellada, la d'aligot, la gegant...La diversitat genètica estava connectada, doncs, amb la diversitat lingüística. També ho està amb la diversitat organolèptica, és a dir amb la variabilitat de textures, gustos i aromes dels aliments, atenent que s'ha assenyalat que la diversitat genè-

tica es trasllada al perfil sensorial dels aliments (Folta and Klee, 2016). L'erosió genètica, la lingüística i la sensorial semblen, doncs, connectades, i en un context de McDonalització alimentària sembla que ens dirigim cap a un procés d'acceleració de l'erosió de les tres diversitats. ■

REFERÈNCIES BIBLIOGRÀFIQUES

- Bitocchi, E., Rau, D., Bellucci, E., Rodriguez, M., Murgia, M. L., Gioia, T., [et al.]. (2017). "Beans (*Phaseolus* spp.) as a Model for Understanding Crop Evolution". *Frontiers in Plant Science*, 8, 722. DOI: 10.3389/fpls.2017.00722.
- Blanca, J., Sanchez-Matarredona, D., Ziarsolo, P., Montero-Pau, J., van der Knaap, E., Díez, M. J., [et al.]. (2022). "Haplotype analyses reveal novel insights into tomato history and domestication driven by long-distance migrations and latitudinal adaptations". *Horticulture Research*, 9, uhac030. DOI: 10.1093/hr/uhac030.
- Brücher, H. (1989). *Useful Plants of Neotropical Origin*. Berlin: Springer Berlin Heidelberg. DOI: 10.1007/978-3-642-73313-0.
- Casals, J., Rull, A., Isern, H., and Rivera, A. (2020). "El Banc de Germoplasma Fundació Miquel Agustí - Universitat Politècnica de Catalunya (FMA-UPC), patrimoni de l'horticultura catalana". *Quderns Agraris*, 49. DOI: 10.2436/20.1503.xx.xx.
- Diamond, J., and Bellwood, P. (2003). "Farmers and Their Languages: The First Expansions". *Science* (80-.), 300, 597-603. DOI: 10.1126/science.1078208.
- Esquinas-Alcázar, J. (2005). "Protecting crop genetic diversity for food security: political, ethical and technical challenges". *Nature Reviews Genetics*, 6, 946-953. DOI: 10.1038/nrg1729.
- Folta, K. M., and Klee, H. J. (2016). "Sensory sacrifices when we mass-produce mass produce". *Horticulture Research*, 3, 16032. DOI 10.1038/hortres.2016.32.
- Mazoyer, M., and Roudart, L. (1997). *Histoire des agricultures du monde. Du néolithique à la crise contemporaine*. Paris: Éditions du Seuil.
- Rivera, A., Fenero, D., Almirall, A., Ferreira, J., Simó, J., Plans, M., [et al.]. (2013). "Variability in sensory attributes in common bean (*Phaseolus vulgaris* L.): a first survey in the Iberian secondary diversity center". *Genetic Resources and Crop Evolution*. 60, 1885-1898. DOI: 10.1007/s10722-013-9963-6.
- Westengen, O. T., Okongo, M. A., Onek, L., Berg, T., Upadhyaya, H., Birkeland, S., [et al.]. (2014). "Ethnolinguistic structuring of sorghum genetic diversity in Africa and the role of local seed systems". *Proceedings of the National Academy of Sciences*, 111, 14100-14105. DOI: 10.1073/pnas.1401646111.

SURVOJE AL FORMORTO (KAJ KION FARI PRI TIO)

Klara Ertl

klimata aktivulo, edukisto kaj denaska esperantisto

Sandra Vives

klimata aktivulo kaj vicprezidanto de KEA



Extingtion Rebellion (XR) okazigas senperfortajn rektajn agojn de civila protestado. Ni celas ellogi registarajn agojn pri la klimata kaj ekologia krizoj ĉar ni rekonas ke individuaj agoj ne sufiĉas kaj okazigi daŭripovan ŝanĝon kiu estu socie justa. La scienca konsento estas sendubita: 100% de la tutmonda varmiĝo ekde 1950 ŝuldiĝas al homoj kaj preskaŭ la tuta hejtado ekde 1850 ŝuldiĝas al forcej-efikaj gasoj kaj aliaj homaj agadoj.

La tera varmiĝo havas kvar gravajn efikojn: malsekegojn, troojn da akvo en ŝtormoj, senprecedencajn fajregojn kaj kreskon de la mar-niveleoj pro fandiĝantaj glaĉeroj. Ĝis nun ni parolas pri la efikoj de 1,1-grada kresko, sed ni devas ankaŭ pensi pri tio, kio sekvas. Nia nuna elekto estas inter plena tutmonda katastrofo kaj iom malpli grava krizego. Tutmonda malsato kreskas kaj pli da lokoj havas gravajn mankojn de akvo: la klimato estas nur parto de la estonta problemoj.

Ankaŭ okazas krizo de la biosfero. Naturo detruigas tutmonde laŭ rapideco neniam antaŭe vidita dum la homa historio, kaj la rapideco de formorto de specioj akceliĝas. Ni detruas la bazon de niaj ekonomioj, niaj manĝaĵoj kaj niaj fontoj de sano kaj de kvalita vivo tutmonde. En la historio de la tero okazis jam kvin antaŭaj amasaj

formortoj kaj la nuna estas kaŭzita de la ege kreskanta homa konsumado, ne de naturaj eventoj.

Por provi solvi ĉion ĉi, ni devas fari la ĝustan agon: por aliaj — ĉar la Tutmonda Sudo ne kaŭzis la problemon —, por la venonteco — por niaj gefiloj kaj genepoj —, por ni mem — ĉar ni havas la rajton je mem-protektado — kaj por la planedo.

Se ni faros nenion alian, ni devas haltigi la ellason de emisioj de brulado de fosiliaj brulaĵoj. Por ke ni havu ŝancon resti sub la temperaturkresko de du gradoj, individuaj agoj sole ne funkcias. Estas gravege instigi sisteman ŝanĝon en registaroj, internaciaj organizoj kaj korporacioj. La strukturaj problemoj devenantaj de la kapitalisma sistemo ignoras la valoron de la venonteco kaj la leĝojn por limi poluadon ne sufiĉas. Ni devas rompi la regulojn per civila rezistado kaj tiel trudi ŝanĝon al sistemo, kiu rifuzas ŝanĝiĝi.

XR havas tri grandajn postulojn: ke la registaroj kaj la gazetaro diru la veron pri la aktuala situacio; ke la registaroj deklaru laŭleĝan celon por nete nula ellaso de forcejaj gasoj ĝis 2025; kaj la Civitana Asembleo, kiu decidos la paŝojn por realigi la menciitajn celojn. La decidoj de la Asembleo devas esti laŭleĝe devigaj por plifortigi nian demokration.

Senperforta rekta agado estas la maniero kiun XR elektis por agi, kiam ĝi lanĉiĝis en 2018. Ni koncentras nian agadon en lokoj, kie kuŝas potenco kaj celas perturbi kaj krei dilemojn en la potenculoj, korporacioj, financaj institucioj, miliarduloj ktp. Por fari tion ni bezonas homojn. Estas multegaj manieroj por helpi kaj ni vere bezonas vin! Krom arestebluloj dum la agadoj, ni volas milionojn da aktive partoprenantaj homoj en tre malsamaj roloj kiuj helpas al nia movado elteni, kreski kaj esti ĝuata.

Ni funkcias en malcentrigita strukturo kaj tio signifas ke homoj povas senti sin egale gravaj, se ili subtenas niajn celojn kaj postulojn kaj sekvas niajn dek principojn kaj valorojn. Ili estas sur nia retejo (<https://rebellion.global/>). Ene de XR ni strebas konstrui regenerigan kulturon kiu subtenas vivon kaj nian propran kreskon.

La movado estas internacia! Ĝi rapide kreskis, unue en Britio kaj poste tra la mondo. Novaj grupoj daŭre aperadas, nun en 85 diversaj landoj. Se vi interesiĝas, kontaktu vian lokan grupon aŭ serĉu la Telegram-grupon “XR-anoj de Esperantujo”, kie aktivuloj de diversaj landoj interŝanĝas novaĵojn, spertojn kaj ideojn pri agado de XR en Esperanto. ■

JOSEP MARIA JUJOL, ĈU EKOLOGIISMA ARTIST-ARKITEKTO?

Sol Roca

Membro de KEA. Emerita instruistino de la publika baza lernejo



Josep Maria Jujol i Gibert (1879-1949)

Josep Maria Jujol [pr. ĵujol'] (1879 –1949) naskiĝis en Taragono. Kiam li estis 9-jaraĝa li translokiĝis al Barcelono kun sia familio kiu volis doni pli da ŝancoj al la eta Jujol kiu jam elstaris en desegnado. Li studis arkitekturon. 22-jaraĝa li eklaboris en la metiejoj de gravaj arkitektoj kaj poste kunlaboris kun la arkitekto Antoni Gaudí, kun kiu li konservis dumvivan amikecon. Li estis profesoro ĉe la Barcelona Altlernejo de Arkitekturo kaj en la Labor-Lernejo. Li havis postenojn kiel municipan arkitekton en la urbo Sant Joan Despí (proksime al Barcelono).

Li amis Taragonon. Malgraŭ sia transloĝiĝo li neniam forgesis sian naskiĝlokon kiu tiom inspiris lin.

Li laboris en multaj urboj kaj vilaĝoj de la Kataluna Landaro (Taragono, Barcelono, Majorko, ktp).

Li estis prudenta homo, tre diskreta, humila kaj ege religiema. Li havis afablan kaj facilan karakteron.

En siaj verkoj Jujol montris grandan sentemonpor la formoj de la naturo, intereson pri metiista detalo kaj ornamado, kreivan reuzon de malnovaj aŭ

rubaj materialoj, serĉado de monŝparaj solvoj, eksterordinara uzo de la koloro. Li ne eltenis malplenajn spacojn, kaj simetrio enuis lin. Multaj el ĉi tiuj punktoj koncernas la modernisman stilon, pro tio oni diras ke li apartenis al la modernisma movado sed ne ĉiuj fakuloj konsentas. Ĉiuokaze li estis malfrua modernisto. “Jujol studis kaj lernis de modern-

istoj sed li disvolvis sian propran lingvon,” diras Roger Miralles (arkitekto kaj profesoro de la Universitato Rovira i Virgili). Lia produktado karakteriziĝas per granda sentemo, originaleco kaj senbrida imago. Li havis liberan, sendependan kaj kaprican stilon.

Jujol estis diverstalenta persono: krom arkitekto, li estis ankaŭ deko-

Detalo de trencadís (rompitaĵo) de la onda benko, Park Güell, bela kaj utila majstroverko de Jujol.





Angelo vento-montrilo de domo Bofarull, Pallaresos (Taragono). Bela kaj utila verkaĵo uzante forĵetitajn elementojn

Fragmento de sonorilo

Ferpecoj el forĵetitaj elementoj

Stangoj el rubmaterialo

raciisto, dezajnisto, projektisto de la plej diversaj elementoj, pentristo, sgrafitisto, skulptisto, ilustristo, akvarelisto... Li regis kaj ĝuis la uzon de koloro, desegnado kaj metiistaj laboroj, kiujn li mem praktikis.

Sed mi konsideras lin el la vidpunktoj de la ekologio. Li kapablis labori per tre malmultaj rimedoj, reutiligante ĉion, kio venis al siaj manoj. La simpleco de la rimedoj uzitaj de li kontrastas kun la eksterordinara rezulto de siaj verkoj.

Jujol ne nur reuzis por utiligi materialojn. El la reuzo li kreis arton. Kaj, sekvante principon de Leonardo da Vinci, al multaj el tiuj artaĵoj li aldonis utilecon (vidu foton).

Oni scias ke ekologio ne temas nur pri la reuzo de materialoj. Temas ankaŭ pri la rilato kiun ni havas al la medio kaj kun homoj. En ĉiuj el tiuj aspektoj Jujol elstaris. Lian rilatkapablon oni povas emfazi pere de ĉi tiuj tri punktoj:

1. lia rilato al materialoj - *reuzado, rekuperado, reduktado, recikligo* – digniga;

2. lia rilato al la medio - *natur, pejzaĝo, ĉirkaŭaĵo, proksimeco* – respektama;

3. lia rilato kun homoj - *laboristoj, klientoj, publiko* – proksima kaj afabla.

Tiuj tri punktoj ofte havas ekologiajn trajtojn. Tio kuraĝigis min paroli pri JUJOL EKOLOGIISMA, eĉ se tiu ĉi koncepto ne ekzistis liatempe.

Kial, do, Jujol, kiu ŝajnas tiel valora, estas tiel nekonata? Jen kelkaj motivoj: Li estis, laŭ naturo, prudenta kaj diskreta, tial li ne projekciis sin eksteren. En la komenco li kreskis je la ombro de Gaudí. Aliflanke liaj klientoj, ofte, estis etaj terposedantoj aŭ parokestroj en malgrandaj vilaĝoj, tio signifis foreston de grandaj mendoj. Eĉ, kelkfoje, li faris ĉi tiujn laborojn senpage, pro amikeco aŭ amo al la loko.

Krom la konsidero de Jujol kiel ekologiisma artist-arkitekto ni devas konscii ke li estis pli ol tio. Prenu ĉi tiun tekston kiel gustumadon de tio, kion vi povas trovi, se vi enprofundiĝas en la personon de tiel kompleta artisto. Mi invitas vin fari tion. ■



Segueix-nos a: / Sekvu nin en:

Instagram

@esperanto_cat / @kej.esperanto

Carlo Minnaja
akademiano, matematikisto, eseisto kaj historiisto

Preter la specifa difino, por dementi negativajn juĝojn bona argumento estas la tradukoj el esperanto al etnolingvoj. Nu, bonvolemluloj elektas indan verkon kaj ekagas. Rezulte: kiom da verkoj estas ene de nia literaturo tiom elstaraj, ke ilia traduko esperigas profitan vendadon? Bedaŭrinde ege malmultaj. Tute freŝa enketado ĉe elstaruloj de nia kulturo el Barato, Francio, Italio, Ĉinio, Hungario, Rusio, Svedlando rezultigis, ke, ekzemple, *La Infana Raso* estis komplete tradukita nur



en la hungaran (far István Ertl) kaj en la italan (far Nicolino Rossi); inter la prozaj, *Maskerado ĉirkaŭ la morto* estis hungarigita de Ertl kaj italigita de Margherita Bracci Testasecca, sed la propono al la sama itala eldonisto publikigi la italigon de *Sur sanga tero* eĉ ne ricevis respondon. De *Kiel akvo de l' rivero* ne estis publikigita italigo jam tute preta, ĉar la heredinto(j) ne permesis; samkaŭze ne aperis la rusigo de *Vojaĝo al Kazohinio*. Nek pli bonan ŝancon havis nia plej altnivela teatraĵo, *Sonĝe sub pomarbo*: tradukita al neniu etnolingvo, ĝi eĉ estis neniam ludita dum UKe; laŭ persona deklaro de la karmemora György Nanovfszky iam estis sursceneje prezentita nur mallonga ero de ĝi far studenta trupo el Budapeŝto.

”

Lastatempe enmodiĝis publikaj legadoj, surstrate aŭ traradie-televide, de esperantaj tekstoj kun etnolingva traduko, kiujn ni povus konsideri “voĉaj antologioj”

Kompreneble traduko de peza verko estas tre engaĝa. Ja troviĝas pluraj unuopaj eroj aŭ fragmentoj en revuoj, okazas publikaj legadoj en la hispana kaj en la itala, sed ege malmultas la antologioj, kvankam pli facile produkteblaj, ĉar ili ankaŭ permesas plurajn tradukantojn sen la risko malhomogenigi fakte nehomogenan kolekton.

Ekzistas en la angla *Star in the night sky* de Paul Gubbins, 450-paĝa, ekzistas la esperanta-rusa *La vojo* –

Putj de Miĥaelo Bronŝtejn; *Vozes do Esperanto*. Antologia kunigas dek kvar poetojn de Baghy ĝis Ruggiero tradukitajn al la portugala de Suso Moinhos; ekzistas kunmeto en la franca, same antologio en la hungara, kolekto de 29 noveloj en la sveda (tradukis Johansson kaj Nordenstorm); ĵus aperis en la itala, kun la originaloj vidalvide, antologio entenanta 64 poetojn kaj preskaŭ ducent poemojn, kun ampleksaj aŭtoraj prezentoj de Zamenhof ĝis Silas, far Carlo Minnaja kaj Nicolino Rossi; sed, krom tio, preskaŭ nenio plu. Certe antologio povas ne havi la dimension de dika volumo, sed ĝi donas ideon pri nia literaturo multe pli kompletan ol la traduko de ununura verko, kiom ajn grava elvokive ĝi estu.

Lastatempe enmodiĝis publikaj legadoj, surstrate aŭ traradie-televide, de esperantaj tekstoj kun etnolingva traduko, kiujn ni povus konsideri “voĉaj antologioj”. Unuflanke, eble pandemio, ŝajne (kaj espereble) malpli agresa, instigis personojn eliri el siaj hejmoj kaj renkonti aliulojn subĉiele post du jaroj da enfermiĝo; aliflanke la registaraj ordonoj por ne-densiĝo, ne-amasiĝo, ne-kuniĝo, maskosurporto stimulis novajn radioelsendojn, babilojn per Skajpo, Zomo aŭ alia sistemo. Je la unua sabato de la monato, kun paŭzo en julio-aŭgusto, Parizo kaj Romo esploris pri ĝemelaj urboj koncerne geografion, socian vivon, manĝokutimojn. En la reta kunveno de la Itala Esperanto-Federacio sub la temo “kion legi dum la ferioj?” konsilis la tridekon da zomaj spektantoj la kutimaj Nicolino Rossi kaj Carlo Minnaja, legante erojn el Steele, Tófalvy, Štimec kaj aliaj, kaptante ankaŭ la okazon por prezenti la italigon de *Libazar' kaj tero*, 450-paĝa kvarmana sonato de la karmemoraj geedzoj Julia Sigmond kaj Sen Rodin, forpasintaj pro kovimo.

En junio aperis la jena sciigo: “*Kunlabore kun UEA kaj ĝia komisiono de Belartaj Konkursoj (BK) la 3a Liaoning Recitado de Esperantaj Poemoj preparata de Liaoning-a Esperanto-Kultura Klubo (LEKK) por*

la Esperanto-tago (la 135a datreveno de Esperanto) okazos en la 30a de julio, 2022, en Shenyang, ĉefurbo de la provinco Liaoning, Ĉinio. Ni entute elektis 10 poemojn de la verkistoj István Ertl, Neide Barros Reĝo, Jean-Marie Ries, Mao Zifu, Jesper Lykke Jacobsem, Aleksandro Mitin, Nicola Ruggiero, Tatjana Auderskaja, Sergo Sir kaj Tiberio Madonna, premiitajn en BK, kaj tradukis ilin en la ĉinan”. Tre ĝojiga surprizo: ekzistas grupo dediĉita specife al la esperanto-kulturo.

Ĉu ĉi tiu alimaniere eferveska agado montris kreigon de novaj literaturaj tendencoj? Sendube lastatempe estis ege abunda la verkaro de la novakademiano Julian Modest (ps. de Georgi Miĥalkov), prezidanto de la esperanta PEN-centro, kiu superŝutas nian legdeziron per inter tri kaj kvin prozaj verkoj ĉiujare. Plejofte noveloj, aŭ novelaroj. Iuj malicaj recenzantoj diras, ke liaj noveloj estas ĉiam egalaj kaj monotonstilaj, kaj ke jam de la komenco oni antaŭvidas la finon; eĉ ne ja, ne ĉiam la novelo konkludiĝas, sed lasas al la legantoj mem imagi la postlastan scenon, facile konstrueblan se oni konsideras, ke ĉiuj rakontoj de Modest estas pozitivaj, edificaj, feliĉfinaj. Lia lasta novelo *La boato*, aperinta en *Monato*, julio 2022, uverturas tiel: “Jam de jaro en la urbo regas kaoso”. *Estas pafoj kaj eksplodoj*. La fina frazo de la unusolpaĝa rakonto (triminuta legado) vin sternas: “la bono venkis la malbonon!” Kio estas skribita en la mezo fakte ne gravas: la starto vin ĉirkaŭas per katastrofa atmosfero kaj la fino vin lasas morale trankvila, do la novelo estas sukcesa. Ĉu vere Modest gvidas tendencon? Interesulin kompari kun hungaro István Nemere, ankaŭ prezidinto, siatempe, de la esperanta PEN, pioniro en la kampo de denaskismo kaj organizinto de la unua renkontiĝo de esperantofamilioj: li verkis pli ol dudek esperantlingvajn romanojn en ĉ. 30 jaroj, kaj pli ol 100 hungarlingvaj.

Kara leganto, legu multajn librojn: vi trovos da bonaj eĉ pli ol vi supozas. ■

KATALUNA SKOLO

Valentin Melnikov

akademiano, poeto kaj literaturkritikisto

Mi regule serĉas interrete materialojn pri originala Esperanto-literaturo, kaj ofte trovas ne (nur) la serĉaĵon, sed ion tute senrilatan. Antaŭnelonge mi hazarde trafis la retejon esperanto.es – kaj tie la “bitotekon” kun riĉa kolekto da skanitaj libroj, elŝutis plurajn...

Oni ofte plendas, ke dram-arto en Esperanto, kompare kun poemoj kaj noveloj, troviĝas en mizera stato. Estimata Prezidanto de Belartaj Konkursoj de UEA s-ro Miguel Fernández ĉiujare esprimas bedaŭron pri malgranda kvanto kaj malalta nivelo de konkursantaj teatraĵoj, eĉ nova subbranĉo “monologo kaj skeĉo” aldonita en 2018, ne multe helpis. Ĉu vere nenio fareblas, ĉu temas pri objektivaj problemoj (neekzisto de konstanta teatro en Esperanto, ks.)? Tamen ne ĉiam estis tiel.

Se kelkaj verkistoj regule renkontiĝas kaj reciproke influas, tio kontribuas al evoluo de ilia kreado, en iliaj verkoj sentebblas komunaj trajtoj. Tiam oni parolas pri certa literatura skolo. En Esperanto ni konas la skolojn Budapeŝtan, Skotan, Pragan, Moskvan... ankaŭ la Iberan skolon de poezio kaj novelarto ekde 1990aj jaroj. Sed mi neniam aŭdis mencion pri Kataluna skolo de Esperantlingva dramo en unuaj jaroj de 20a jc. Tamen ĝi sendube ekzistis.

Preskaŭ samtempe aperis kelkaj bonegaj dramverkoj de katalunaj aŭtoroj. Ni atentu kelkajn.

Miquel Cases Martin (1863-?), urba oficisto, aktoro kaj gvidanto de amatora teatro. En 1910 aperis lia amuza unuakta komedieto “Mistera krimo”, 37-paĝa broŝuro.

Vilaĝa boatisto Ramono ŝatas krimhistoriojn, kaj – liaaserte – malkaŝis kvar krimojn: “Mi devis esti policano anstataŭ pramisto”. Loka juĝist-helpanto Luko revas ke okazu granda krimo – tiam li famiĝos. Gastej-mastrino Baltazarino estas atentema, suspektema kaj klaĉema... Do krimo ne povis ne okazi... Ŝajne ĉio konfirmas okazintan perfidmortigon (la vorto “murdo”, probable, tiam ankoraŭ ne ekzistis en Esperanto). Advokato (same – loka, amatornivela) jam admonas la akuzaton: konfesu, tiam vi ricevos nur 15 jarojn da mallibero, sed se ne – vi iros al eŝafodo. Tamen povra akuzato ja scias, ke li neniun murdis – sed li ne povas rakonti la tutan veron pro “delikata” kaŭzo... Kiel en ĉiuj klasikstilaj verkoj, ĉio finiĝas bone.

Flua parolstilo – kvankan Esperanto tiam estis nur 20-jara. Amuzaj diroj: ĉe juĝa pridemandado oni devas formale enketi personon, do al “Ĉu via aĝo?” virino respondas “Konstatigu pli ol kvardek jarojn.” Kaj aŭdas: “Mi ĝin kredas! Kaj pli ol sesdek ankaŭ.” Plia jura formalajo: oni devas solene ĵuri per dekstra brako, sed vilaĝanoj ne tuj konstatas, kiu brako estas la dekstra. Viron tre amuzas rakonto pri malfideleco de ies edzino – ĝis kiam klariĝas, ke temas pri lia propra...



Do vere bonega teatraĵo. Iom arkaika stilo ne ĝenas – sed vere ĝenas multegaj preseraroj: krom deko da listigitaj lastpaĝe eble plia cento disemitas tra la teksto. Tial mi hezitas rekomendi la libron al komencantoj, sed spertaj legantoj nepre ricevos grandan plezuron.

Frederic Pujulà i Vallès (1877-1963), advokato kaj verkisto, plurfoje mem prezentis siajn verkojn sur scenejo. En 1907 aperis lia 33-paĝa broŝuro “La Rompantoj”, enhavanta kvin monologojn. Ĉiu el la malfeliĉaj herooj ion rompas: botelon, pipon, telerojn, fotilon... nur la lasta, “okaza artisto”, rompas neniun fizikan objekton – sed jes la koncepton de spektantoj pri teatra arto. La aŭtoro en la antaŭparolo humure asertas: “Ĉiuokaze la legontoj tamen nin pravigos, kiam ni certigas, ke «Okaza Artisto» estas ankaŭ rompanta viro. Ĉar, se ili akceptas, ke li rompas, ni interkonsentas; kaj, se ili tion ne akceptas kaj ekprovas pruvian opinion, tiam ili konstato, ke la Artisto estos kaŭzo, ke ili al si rompos la kapon por diveni kaj analizi aferon, kiu enfine ne valoras eĉ buŝon da fumo de la frakasita pipo de la «Pipamanto».” Ĉiu monologo estas ilustrita per konvena foto, ĉarme impresanta per tiama etoso. Ĉiu heroo fakte tre malfeliĉas, sed la spektantoj povas rideti...

En 1909 de la sama aŭtoro aperis 37-paĝa “Frenezo”, libreto enhavanta du unuaktajn drametojn – “Aŭtunaj ventoj” kaj “Novelo”. Tiuj fakte estas tragedioj, montrantaj tre versimile konduton de freneza homo, kiu povas kaŭzi teruraĵojn – kaj bedaŭrinde nenio fareblas por preventi tion. Legajo peza, sed pensiga... La verkoj konformas al tradicioj de teatro, kaj pruvaskienialingvo, tiam ankoraŭ tute juna, perfekte taŭgas por ĉiuj specoj de literaturo – pri kio, i.a. skribas Carlo Bourlet en la antaŭparolo: “Tiuj-ĉi du belaj drametoj pli faros por firmigi nian lingvon, ol mil broŝuroj de miopaj filozofoj.”

Vicente Inglada Ors (1879-1949), militisto kaj sciencisto. En 1907 eldoniĝis lia 44-paĝa “Edziĝo malaranĝita aŭ terurane kompreniĝo”, kun subtitolo aŭ ĝenro-difino “Teda dialogo en unu sceno”. Sekvajare tiu verko estis represita en 126-paĝa kolekto “Prozo kaj versoj”.

Junulo venas al patro de sia fianĉino por peti geedziĝ-permeson. La patro, nature, volas pli multe scii pri profesio, ŝatokupoj, preferoj ks. de ebla bofilo. Ĉu tiu estas vere stulta, ĉu eble tro sprita kaj ne povas bridi sian spritecon – tamen ni aŭdas tutan bukedon da vortludoj kaj amuzaj miskomprenoj. Krome, la patro estas asekura agento kaj strebas ne perdi

okazon, trudi al la junulo asekuron – kaj tiu klare pruvigas, ke tute ne bezonas ĝin. La edziĝo ne okazos, sed la legantoj vere ĝuas la verkon, absolute netradukeblan al ajna alia lingvo. Jen eble unuafoje, kelkajn jardekojn antaŭ Raymond Schwartz, aperas tiom brila kolekto de vortludaĵoj.

Plie, en “Prozo kaj versoj” troviĝas humura novelo “Mia najbaro” – tiu najbaro, Sinjoro Biskvitama kaj Dolĉekisa, estas spirita antaŭulo de Horaco Ŝercer el satiroj de Lejzeroviĉ (same – multe pli frue!) kaj de Profesoro Klapelkap elpensita de Reto Rossetti. “Atentu pri vorto bovo = B + V, ĉefliteroj de la montrita estaĵo, *Besto Vianda*, besto kies viando estas por ni la ĉefa afero.” – ĉu vi ne tuj rememoras samspecajn vortludojn de R. Schwartz, aperintajn nur jardekojn poste?

Eble indas omaĝe reeldoni ĉiujn ĉi teatraĵojn unuvolume, korektinte preserarojn kaj aldoninte necesajn komentojn. Kaj dume – elŝutu kaj legu!

Krom la menciitaj, en la retejo troveblas ankaŭ legindaj verkoj de Rafael de San Millán Alonso (“Tri rakontoj kaj kelkaj versaĵoj”, 1914), de Artur Domènech i Mas (“Poemoj”, 1937), de Jaume Grau Casas (“Amaj poemoj”, 1924; “La lasta poemo”, 1936) kma. Ne preterlasu okazon! ■



Babilu ankaŭ vi en la grupo de KEA en telegramo

Por asocioj, simpatiantoj kaj scivolemuloj

<http://telegram.esperanto.cat>

POEZIA ANGULO

EN CENTJARIĜO DE FORPASO DE MIQUEL COSTA I LLOBERA

Nicolau Dols

lingvisto kaj poeto

Antaŭ cent jaroj, la 16an de oktobro 1922, Miquel Costa i Llobera (1854-1922) subite mortis en predikejo de monaĥeja preĝejo de Palma (Majorko). Okazis dum predikado meze de la meso. Li estis pastro, kanoniko en la katedralo de Majorko, kaj unu el la plej gravaj poetoj el la historio de kataluna literaturo. La poetoj de movado *Noucentisme* agnoskis lian majstrecon, ĉefe pro la altnivela regado de formo kaj la eleganteco de lia poezio, kies temoj estas pejzaĝo, religia sento kaj admiro pro klasika literaturo. La tria strofo de lia fama poemo “La pino en Formentor” komenciĝas per verso

“Kiame for sur ondoj revivas lumo dia” (laŭ traduko de Josep Grau Casas de “Quan lluny damunt les ones reneix la llum divina”).

En ĉi tiu verso liaj tri interesoj montriĝas: pejzaĝo (“sur ondoj”), religio (“lumo dia”), kaj mediteraneaj klasikaj kulturoj (oriento en aludo de naskiĝloko de la suno).

Jen la tri unuaj strofoj de la poemo (verkita de la aŭtoro kiam li aĝis 21) kune kun la oka kaj lasta laŭ traduko de Grau Casas, kaj ni lasas al leganto juĝadon de la lasta verso: ĉu la “hirund” redonas “l’au dels temporals”?

LA PINO EN FORMENTOR

Kor’ mia amas arbon! Ol kverko, pli fortika;
ol olivuj’, pli aĝa; kun verd’ de oranĝarb’ –
folioj ĝiaj velkas neniam; senefika
al ĝi, giganto, estas atak’ de l’ malamika
ventego de la mar’.

Ne montras ĉe l’ folioj sin floro enamita,
al ĝi kisadi ombron ne iras fontoflu’;
sed Di’ arome ŝmiris la kapon konsekrita
kaj faris al ĝi tronon sur mont’ abrupt-rompita
kaj fonton ĉe marblu’.

Kiame for sur ondoj revivas lumo dia,
ĉe l’ branĉoj ne resonas de birdoj pepmurmur’;
de ĝipaet’ aŭdiĝas la krio energia
kaj flugilegojn svingas super amas’ folia
fluganta la vultur’.

[...]

Animo forta, supren! Transflugu tra nubaro,
sur alt’ enradikiĝu laŭ l’arb en roka grund’:
sub plandoj viaj falos de mond’ kolera maro,
kaj viaj kantoj iros tra ventaro
samkiel la hirund’.



VÍCTOR CATALÀ TORNA A L'ESPERANTO

Pere Fornells

enginyer industrial, resident a l'Anoia,
esperantista des de 2013



Sempre fa il·lusió veure publicada literatura catalana en esperanto. En aquest cas parlem més aviat d'una recuperació, perquè es tracta de traduccions que ja tenen anys i que es tornen a posar a l'abast de tothom. Em crida l'atenció que es tracti només d'una selecció de fragments de *Solitud*, quan la novel·la està completament traduïda. Recordo haver-ne vist com a mínim un exemplar al *librosero* a Castelldefels. Miro si és disponible al catàleg d'UEA: no hi apareix pas. Una llàstima. No sé perquè no s'ha publicat sencera, una novel·la que s'ho val. Potser perquè en una edició bilingüe hauria quedat un llibre massa gruixut.

L'antologia de *Solitud* és prou abundant per permetre a un lector que no conegui l'obra comprendre bona part del seu argument. També n'hi hauria d'haver ser més que prou perquè els lectors de novel·la que no l'hagin llegida s'hi animin. Les notes introductòries, una sobre aquest volum i una altra sobre Víctor Català, són breus, clares, concises i molt interessants. Per al lector tipus les trobo molt adequades, i qui tingui interès a aprofundir sabrà buscar la informació que li calgui.

El fet de tenir una edició bilingüe i poder fer una lectura gairebé en paral·lel dona molta visibilitat al treball dels traductors. La majoria de les traduccions d'aquest llibre són de Josep Ventura i Freixas, però també en tenim de Josep Grau Casas i d'Estanislau Pellicer als relats curts. Personalment, totes aquestes traduccions m'han agradat molt. Adaptin el text d'una manera fluida i amb un gran aprofitament de les característiques específiques de l'esperanto, sense que en cap moment es tingui la sensació que s'està forçant res. El fet que les notes al peu de la traducció siguin bàsicament culturals és una mostra clara d'aquesta bona feina.

Una reflexió que m'ha vingut al cap amb aquesta lectura és fins a quin punt, en poc més d'un segle, se'ns ha fet realment llunyana. A banda de l'evolució remarcable de la llengua catalana en aquest temps, que es fa prou evident, em refereixo principalment al tema que dona el títol a l'obra. Aquesta solitud densa, gairebé infinita, que ho amara tot. Nosaltres, que vivim amb un ordinador a la butxaca i permanentment connectats, podem entendre de debò què és aquest aïllament? Hi podem empatitzar? Com més grans, menys tecnologia ens

acompanyava a la nostra infància, i potser els records poden ajudar, però per als més joves em sembla que hi deu haver una distància sideral. Pensem en el confinament que vam viure no fa gaire com un moment d'un gran aïllament, però d'allà a la solitud que ens narra la novel·la hi ha un abisme. Si després amb tot aquest desplegament de connectivitat ens sentim realment ni que sigui una engruna més acompanyats, ja és un altre tema.

Haver afegit els tres relats curts del final em sembla un gran encert. Sovint, quan un autor produeix un cap d'obra, un gran cim de la seva època, la resta dels seus treballs queden eclipsats, fins i tot invisibilitzats. Tots tres relats són excel·lents i cap lector que tingui entre mans aquesta antologia els hauria de deixar passar. *Substitució* i *Conformitat* tenen un aire de família. Trobo que tenen un no sé què, com els germans que s'assemblen. *Faula serena*, tant per l'estil com per l'escenari, es diferencia més. En aquest darrer cas, el marcatge del ritme sobre el mateix text és un gran encert que guia la lectura d'una manera gairebé instintiva i que fa que la lectura de la versió en esperanto sigui una experiència especialment plaent. ■

DEL SO A LA LLETRA, DE DELFÍ DALMAU

Gabriel Bibiloni
lingüista



Delfí Dalmau era una persona prou desconeguda entre el públic en general i, fins i tot, entre la gent de llengua, fins que la seva obra va ser estudiada i va començar a ser publicada per Jordi Solé i Camaradons (*Poliglotisme i raó*, Pagès Editors, 1998). I, malgrat tot, Delfí Dalmau és una personalitat rellevant en el camp de la lingüística, la interlingüística i la divulgació del català.

Delfí Dalmau (1891-1965) va ser un pedagog avançat, defensor del mètode Montessori per a l'ensenyament dels infants i creador del Liceu Dalmau d'ensenyament mitjà i tècnic, que arribà a tenir quinze establiments a Barcelona, una filial a València i una altra a Madrid. Participà en els mètodes més moderns per a l'ensenyament d'idiomes, com el mètode Linguaphone o l'ensenyament amb discs. Fou promotor de l'estenografia o taquigrafia, per a la qual creà un mètode universal i el primer mètode aplicat al català. Fou un poliglota apassionat i un defensor i promotor de l'esperanto. Va presidir la Federació Esperantista Catalana, representà el català a l'Akademio de Esperanto (La Haia), fou delegat d'Espanya a la Universala Esperanto Asocio (Rotterdam) i

participà en la redacció de la revista *Kataluna Esperantisto*. En esperanto publicà *Dialekto, dialektiko* (Editorial Belpost, 1956) i *Esperanta resume de la stenologio kaj stenografio* (1961). Amic i seguidor incondicional de Pompeu Fabra, també fou un divulgador de l'obra del gran lingüista barceloní, i encara participà en la difusió del *Diccionari català-valencià-balear*.

Dalmau va estar molt actiu en el temps de la II República espanyola. Publicà articles a la premsa, féu conferències i fundà el periòdic *Clarisme*, adreçat a la joventut. El 1936 publicà la seva obra més important, *Poliglotisme passiu* (Barcelona, Publicacions de La Revista), que fou precedida per *Polèmica* (Edicions Clarisme, 1934). Per si això fos poc és autor de tres novel·les: *Seny i atzar* (Llibreria Catalònia, 1932), *Una altra mena d'amor* (Clarisme, 1933) i *Sinceritat* (1938). La dictadura de Franco imposà, a ell i tot el país, un silenci paralitzador, però, malgrat tot, continuà la seva tasca, i el 1962 publicà *Aclariments lingüístics* (Rafel Dalmau, editor), en què reprèn els elements del fil director de la seva ideologia: la defensa de totes les llengües, la igualtat d'aquestes i la necessitat d'una llengua neutra internacional.

El nostre poliglota deixà escrits altres textos; menors, complementaris però no mancats d'interès. El seu fill, Delfí Dalmau i Argemir, els ha arreplegats, classificats, ordenats, i el resultat és el llibre que ara ressenyam, *Del so a la lletra*, títol que sembla que era pensat per al que sortí titulat *Aclariments lingüístics*, esmentat més amunt. A més porta un títol tan contundent com *Papers contra la imbecilització lingüística* (*imbecilització* hauríem escrit nosaltres). Són papers que anà escrivint en el transcurs de tota la seva vida; textos molt diversos escrits en circumstàncies també molt diverses. El recull integra, fins i tot, alguna nota manuscrita sobre un full de calendari, que el recopilador no ha volgut deixar perdre.

El llibre consta de cinc parts. La primera, que és la més extensa —ocupa més de la meitat del llibre—, porta per títol *Llenguatge*. Conté una gran diversitat de notes i idees tant de caràcter lingüístic, com pedagògic com sociolingüístic. Dalmau ha de ser considerat un veritable precursor de la sociolingüística, ciència que, com se sap, va emergir a partir de la segona meitat de la dècada dels anys seixanta del segle XX, al final de la vida del nostre personatge. En escrits de la

dècada dels 20 ja defensa de manera contundent l'ensenyament en català. El pedagog avançat també es fa present al llarg de tota l'obra. Critica els mètodes d'ensenyament d'idiomes rutinaris en el seu temps i advoca per una metodologia menys basada en l'estudi de la gramàtica i la lectura d'obres clàssiques i més centrada en l'aprenentatge de les llengües en situacions quotidianes. Dóna molta rellevància a l'audició —la llengua oral— en l'aprenentatge d'idiomes i anuncia la importància del cinematògraf i del fonògraf —novetats tecnològiques cabdals en el seu moment— per a aprendre idiomes. Ell mateix promogué discs per a aprendre llengües, amb el segell Linguaphone. Particularment, algun disc per a aprendre català amb les veus de Pompeu Fabra, Mercè Rodoreda i ell mateix. No cal dir l'entusiasme que avui sentiria amb les noves tecnologies que ens han canviat la vida.

Amb tot, la idea central d'aquesta secció de *Llenguatge*, i de tot el llibre, és la defensa de la noció que ell anomena poliglotisme passiu, que omple, com hem dit abans, el seu llibre principal, publicat el 1934. «L'ideal pedagògic i lingüístic —diu— seria que l'home no hagués de pronunciar altre idioma que el natiu. Així cada idioma es desenvoluparia lliurement i netament segons el propi geni fins a presentar pura i rica la seva personalitat.» L'estudi dels idiomes estrangers —proposa—, en comptes d'orientar-se a parlar-ne o escriure'n dos o tres, fora millor que s'orientés solament a comprendre'ls, «i amb el mateix esforç podríem arribar a posseir passivament vuit o deu idiomes aliens en comptes de parlar-ne o escriure'n malament, bàrbarament, només dos o tres». Fins i tot fa alguna proposta que reclamaria matissos en el món actual: recomana que no es deixi sentir altres idiomes a l'infant fins que hagi assimilat bé la pròpia fonètica (entre 10 i 12 anys). En contraposició a aquest poliglotisme passiu, creu que el bilingüisme actiu —parlar la llengua de l'interlocutor, que no és la pròpia— és «nefast» i «destrossa la puresa de les llengües».

”

No s'està de retreure errors comesos per figures notables de la ploma en el nostre país, entre els quals no escapen Josep Pla o Eugeni d'Ors

Precisament, la interferència entre les llengües és un altre dels temes centrals del llibre. Dalmau és un poliglot (passiu, suposadament) entusiasta de les llengües i ens obsequia amb contínues mostres de lingüística comparada que fan evident la seva vasta competència. I de les interferències en culpa de manera decidida el bilingüisme o poliglotisme actiu. A llarg de tot el llibre trobam sucoses descripcions d'interferències i ultracorreccions tant en el català com en l'espanyol parlat o escrit sobretot per catalanòfons. En aquest sentit no s'està de retreure errors comesos per figures notables de la ploma en el nostre país, entre els quals no escapen Josep Pla o Eugeni d'Ors. Tal és la contundència contra el multilingüisme actiu que arriba a afirmar que els bilingües o trilingües actius mostren un «empobriment lingüístic, de lèxic, de misèria i de confusió sintàctiques [...] que es tradueix en pobresa cultural essencial».

Continuant en la secció de *Llenguatge*, hi trobam continguts interessants sobre aspectes normatius del català. De fet en bona part el llibre és una lliçó de català. Amb tot, aquí Dalmau no és original sinó un divulgador, sobretot del seu admirat mestre i amic Pompeu Fabra. Dalmau fa de lingüista pur quan analitza ben encertadament errors ortogràfics, com *arpa* (*harpa*),

disseny (*diseny*) o *pessebre* (*pesebre*), però sempre en troba una justificació. Dalmau encarna la cultura de la correcció lingüística, del bon ús de la llengua, però també la fidelitat a la normativa ja establida.


La segona part del llibre és dedicada a la taquigrafia, però no en parlarem per motius d'espai i de prelació temàtica. La tercera part és dedicada a l'esperanto, llengua de la seva devoció. De fet, al llarg de tot el llibre hi ha referències contínues a la llengua creada per Zamenhof, però a les 28 pàgines d'aquesta secció en fa una defensa contundent. Per a ell és la proposta més notòria de llengua internacional, neutra, fàcil i sobretot que estableix la igualtat entre tots els parlants de totes les llengües del món. Llengua que associa a la pau i a la fraternitat universals. És més: per a Dalmau el poliglotisme passiu hauria de ser una fase transitòria cap a la situació en què tothom parli la seva llengua i l'esperanto, la qual faria que l'aprenentatge de llengües alienes fos una opció de mer enriquiment cultural. Un bell ideal que el temps i les circumstàncies no permeten que passi d'una bella utopia. Les dues darreres seccions del llibre s'ocupen d'aspectes biogràfics de l'autor, que sens dubte ajudaran a comprendre millor la seva personalitat, i de reflexions diverses sobre el comportament humà.

En resum, tenim un llibre molt polièdric, que per força ha de ser atractiu per als interessats en la llengua, les llengües, la sociolingüística, la pedagogia i encara altres dimensions al voltant del llenguatge. No cal amagar que és un llibre força repetitiu, cosa que pot ser un xic fatigosa, però ben comprensible en un recull d'escrits tan diversos. Algunes idees poden estar superades, però el nucli conté elements ben vigents, com la defensa de l'ensenyament en català, la riquesa del multilingüisme «ben usat», la necessitat del manteniment de la llengua en les nostres interaccions diàries, tan fonamental en les nostres circumstàncies actuals, i, com a idea marc, la igualtat de les llengües i de les persones. ■

KOMPRENEBLA ESPERANTO

Pere Fornells

industria inĝeniero, loĝanta en Anoia, esperantisto ekde 2013



De antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenas en Esperanto-Sumoo (<http://www.esperanto-sumoo.pl>), rekomendinda kuraĝigilo por legi en Esperanto: mi elkore rekomendas ĝin al ĉiuj ŝatantoj de legado, kiuj volus pli legi en nia internacia lingvo. Post tiu tempo mi ĝuis la ŝancon legi plurajn librojn, ĉefe romanojn, sed kelkfoje ankaŭ poeziajn aŭ nefikciajn. El mia sperto mi volas nun komenti konkludon: mi ŝatas, preferas, kaj ĉiam volas kompreneblan Esperanton. Verŝajne vi jam komprenis min, sed mi klarigu la aferon.

Diskutado pri Esperanto kaj ĝia uzo en literaturo estas tiel antikva kiel la lingvo mem. Mi estas nek lingvisto, nek verkisto, nek fakulo pri ajna afero rilata al Esperanto aŭ ĝenerale al lingvoj. Mi certe nenion povas aldoni al la debato el tiaj vidpunktoj. Nur mi volas komenti pri mia sperto kiel leganto. Kiel homo, kiu ŝatas legi, kelkfoje pro intereso pri iu temo, sed ankaŭ ofte nur kiel distraĵo, sen ajna kultura celo. Kiel leganto, eĉ antaŭ ol eklerni Esperanton, mi konstatis, ke estas multege pli da legindaj libroj ol tiuj, kiujn mi legos dum mia tuta vivo. De tiam mi decidis legi tion, kion mi

volos, sen zorgi ĉu temas pri altkvalita literaturo, ĉu pri aĉkvalita distraĵo, ĉu populara, ĉu strangege ktp. Ankaŭ mi forĵetis honton, se mi ne emas legi ion legendan aŭ se mi legas ion mallegendan. El tiu leganta vidpunkto mi malkovris kaj proklamas mian preferon al komprenebla Esperanto.

Iam mi elektis por sumoo malnovan romanon, verkitan proksimume antaŭ jarcento. Tiu elekto estis mistrafa, finfine nek la rakonto nek la roluloj interesis min. Legado iĝis iom teda. Mi tamen baldaŭ rimarkis, ke mi sukcesis ĉiutage sen granda peno plenumi la planitan legadon. Kelkajn tagojn poste mi komprenis la kialon: legado estis tre flua. Kvankam de antaŭ sufiĉe longa tempo mi ne plu estas komencanto, ofte mi bezonas, po kelkaj fojoj por paĝo, elpensi signifon de iu vorto el la kunteksto aŭ eĉ serĉi ĝin en vortaro. Domaĝe! Tamen, cent jarojn antaŭe granda amaso da neologismoj ne ekzistis kaj subite legado fluis. Mi spertis tion denove ĉi-jare legante samepokan poezian libron. Ho, legebla poezio en Esperanto eblas! Nu, mi jam sciis, de kiam en esperanta aranĝo mi aŭskultis Mikaelon Bronŝtejn, rusia verkisto kaj kantisto, kiam

li asertis ke, kontraŭ ĉies opinio pri esperanta poezio, li verkas poezion kompreneblan. Kaj li pravis.

Esperanta literaturo havas grandan malsimilecon kun aliaj. Mi dubas, ĉu eblas trovi alian literaturon kun simile malgranda proporcio da denaskaj legantoj. Des pli, miaopinie, oni bezonas kompreneblan lingvon. Ne malpli kvalitan, sed ja malpli neologismeman. Normalas trovi multajn novajn vortojn, se verko rilatas ekzemple al malproksima historia tempo (reala aŭ fantazia), geografio aŭ metio de karakteroj. Sed eĉ tiam, kiel leganto mi volas kiel eble malpli.

Mi aldonas, ke neologismoj plej ofte same ĝenas min, se temas pri vortoj, kutime latinidaj, kiujn mi tuj komprenas. Ĉefe se evidentas, ke oni uzas ilin por fuĝi de vortoj kun regulaj prefiksoj aŭ sufiksoj (la plej ofta viktimo de tia anstataŭado estas la prefikso mal). Tiu kutimo ege malplezurigas mian legadon kaj malemigas min legi pliajn verkojn aŭ tradukojn de tiuj aŭtoroj, eĉ se ili aspektas tre interesaj. Tiu lasta komento malpli rilatas al la enhavo de tiu artikolo, sed bonvolu konsideri ĝin, se vi iam rekomendos al mi esperantan libron. ■

KATALUNA ESPERANTISTO: UNA CAPÇALERA AMB MÉS DE CENT ANYS D'HISTÒRIA

Xavier Margais Basi
historiador

El primer de gener del 1910 apareixia el primer número de *Kataluna Esperantisto*, portaveu de la Federació Catalana d'Esperantistes. No era l'única revista pròpia del moviment, atès que a Barcelona es publicava també *Tutmonda Espero*, des de 1908 fins al juny del 1914. La capçalera d'ambdues revistes era feta segons el disseny que imperava aleshores, en ambdós casos amb lletres d'estil modernista.

El modernisme a Catalunya anava lligat a un intent de recuperar la cultura catalana i de modernitzar el país. No era només una opció estètica sinó que era també una opció ideològica que pretenia allunyar l'art, i, per tant, la vida, de la rigidesa i de l'homogeneïtzació. En l'art i, per tant, també en les arts gràfiques cercava la inspiració en les formes de la natura i això es traduïa en una preferència per les línies corbes, la sinuositat, l'estilització i l'asimetria.

És molt difícil, pràcticament impossible, arribar a saber qui dissenyà les lletres de les capçaleres de les dues revistes esperantistes, però podem suposar que les impremtes on les editaven hi tingueren una important responsabilitat. Els im-

pressors treballaven, com els altres artesans, sovint anònimament. En el cas de *Tutmonda Espero*, la impremta fou la Tobella i Costa, i *Kataluna Esperantisto* fou editada a la impremta de L'Avenç. Totes dues impremtes tenien una trajectòria reconeguda dins el modernisme. *Tutmonda Espero* va tancar les portes el 1914 víctima innocent de la Gran Guerra.

En canvi *Kataluna Esperantisto* va sortir al carrer fins al final de l'any 1936. Tot i que la seva direcció es veí obligada algunes vegades a canviar d'impremta, el disseny de les lletres de la capçalera mai no fou canviat. La guerra del 36-39 i posteriors esdeveniments protagonitzats per la dictadura feren que *Kataluna Esperantisto* no tornàs a aparèixer fins al juny del 1982, és a dir, quaranta-sis anys més tard. La numeració, el número 234, fou consecutiva amb la de quaranta anys enrere i amb idèntica capçalera a la coberta, expressant així que hi havia un fil que ni la guerra ni la dictadura havien aconseguit trencar. Llegim a l'editorial del número de juny del 1982 "...ni decidis aperigi denove la revuon *Kataluna Esperantisto*, kvazaŭ ĝi estus nura daŭrigo de la antaŭmilita samnova revuo, kvazaŭ nenio speciale grava estus okazinta



inter 1936 kaj 1982, inter tiu n-ro 233 kaj ĉi tiu n-ro 234..."

A la coberta del número 234 hi havia la capçalera de sempre i també una petita reproducció de la coberta del darrer número del 1936 i un suplement, també amb les mateixes lletres modernistes, amb diversos treballs literaris premiats en els Jocs Florals Internacionals dels anys 1979 i 1980. En realitat era un número on per tres vegades es mostrava orgullosament la capçalera de quan s'havia creat la revista fins aquell moment en què es reprenia de bell nou.

Avui, en un món globalitzat, on el menjar, la música, els vestits, les botigues, les ciutats, les lletres... són cada vegada més iguals i homogenis, la nostra capçalera ens fa únics i diferents, arrelats a un passat del qual ens enorgullim i actuant en un present que té com a valor la diversitat. No volem renunciar a les nostres arrels. ■

100 JAROJN ANTAŬE

LA BARCELONA SPECIMENA FOIRO INVITIS KEF PARTOPRENI

Xavier Margais Basi

historiisto

Laŭ peto de la Asocio de Fabrikistoj de Ludiloj kaj kun la kunlaboro de Foment del Treball kaj de la Urbo-domo de Barcelona, en 1920 komencis okazi la Komerca Foiro de Barcelona. La intereso de la katalunaj fabrikistoj estis pelita de la defendo de siaj propraj produktoj kontraŭ tiuj de la eksterlandanoj, kiuj regis la merkatojn.

La firmaoj partoprenantaj en la Komerca Foiro havis spacojn, ekspoziciajn budojn por montri siajn kreaĵojn, kaj ankaŭ por reklami siajn varojn. Unue, la Foiro estis nacia kaj poste, en 1922, ĝi iĝis internacia. En tiu ĉi kunteksto de internaciigo, la Direktoro de la Foiro invitis la Katalunan Esperantistan Federacion (KEF) partopreni la aranĝon. KEF akceptis la defion, ricevis budon similan al tiu de la ceteraj foiroj kaj presis milojn da propagandaj folioj por la okazo, kaj ankaŭ aliajn propagandajn materialojn, kiuj estis donacitaj al la vizitantoj de la budo. La sperto estis tiel sukcesa ke ĝi estis ripetita ĉe la 4a Foiro en 1923.

Por organizi la ekspozician budon kaj certigi ke ĉiam estis respondeculoj por akcepti la vizitantojn, KEF havis la partoprenon de membroj de “Paco kaj Amo”, “Nova Sento”, “Barcelona Stelo” kaj “Semo”, kiuj estis organizitaj efike en ambaŭ okazoj.

Dum unu el la tagoj la eniro al la Foiro estis senpaga por esperantistoj. Ĉe la enir-



ejo ili devis montri la verdan kvinpintan stelon.

La membroj de KEF fieris pri tiu sperto kaj en la aranĝo de 1923, la sekretario de la Foiro kaj la prezidanto de KEF interparolis en Esperanto tiel flue, ke tio kaŭzis la admiron de la ĉeestantaro dank'al ĝia sonoreco. La publiko estis admirita observante la utilecon de la internacia lingvo. La sekretario de la Foiro estis Frederic Pujulà i Vallès kaj la prezidanto de KEF estis Jaume Grau Casas, ambaŭ elstaraj kaj gravaj esperantistoj. Bedaŭrinde, la sperto en la sekvaj jaroj estis abortigita pro la puĉo de generalo Primo de Rivera. ■

”

Dum unu el la tagoj la eniro al la Foiro estis senpaga por esperantistoj. Ĉe la enirejo ili devis montri la verdan kvinpintan stelon

NICOLAU DOLS:

«Mi ne verkas por esprimi miajn sentojn»

Suso Moinhos

filologo kaj poeto



Nicolau Dols ne bezonas prezenton. Certe ne en la universitata kaj akademia sferoj, kie li estas referenca persono, sed ankaŭ en literaturo, pri kio li okupiĝas en diversaj manieroj. Ni provis proksimiĝi al li kaj al la diversaj areoj kie li aktivadas, por ekkoni lin pli detale.

Vi estas la prezidanto de la Filologia Fakoj ĉe la Instituto de Katalunaj Studoj. Kiujn defiojn vi alfrontas?

Mi enposteniĝis ĝuste post la publikigo de nova oficiala gramatiko. Nun ni daŭre laboras pri niaj konstantaj celoj (konsultoj pri ĉio kio rilatas al ĝusta uzado de lingvo –leksiko, gramatiko, loknomoj kaj personaj nomoj, ortografio, ktp.–, kaj kompilado de korpusoj). Krom tio, ni ankaŭ esploras la procezojn de normaligo de lingva uzado tra la tutaj teritorioj kie la kataluna estas parolata. Fine, ni komencas la planadon de nova vortaro, grandega verko kiu bezonas jarojn kaj grandan teamon.

Lingvoj konstante moviĝas, ŝanĝiĝas, kreskas, malaperas...

Kia estus nuntempa foto de la kataluna?

Nuntempe ni havas altnivelan konon de la lingvo en la tuta socio dank' al eduksistemo kaj al kelkaj amasinformiloj. Tamen nova faktoro eniris en la panoramon: la amasenmigrado. Ekzemple, en la Baleara Insularo 20 % el la loĝantaro estas fremda. Enmigrado ne estas problemo, ni bonvenigas ĉiujn, kaj kiam ili daŭre envenas, tio signifas ke la ekonomia sistemo kapablas enhavi ilin. La problemo temas pri tro alta kvanto kaj niaj iloj integri ilin en kulturon. Lernigi la lingvon

al infanoj pli-malpli facilas dank' al lernejoj. Al plenkreskuloj tio ja malfacilas, ĉefe pro tio ke en niaj teritorioj (escepte de Andoro), ekzistas laŭleĝe alia oficiala lingvo (la hispana, la franca, la itala), kaj ofte enmigrintoj preferas tiujn aliajn lingvojn okaze ke ili denove devos elmigri al alia loko. Do, la eduksistemo produktas homojn kapablaj komuniki per la kataluna, sed la socia etoso favoras nuntempe la aliajn oficialajn lingvojn. Tio estas grava problemo por garantii la rajtojn de katalunparolantoj. Kurtadire: dum hispanparolantoj neniam trovas problemojn sin esprimi per sia unua lingvo, oni tion ne povas diri rilate al katalunparolantoj. Jen la radiko de malegaleco.

Vi tradukis el pluraj aŭtoroj. Kion vi trovis ĉe Pessoa?

Unu el la plej geniaj aŭtoroj de la dudeka jarcento, sendube... kaj unu el la plej malfacile kompreneblaj kaj tradukeblaj, precipe pro lia inklinado al vortludoj kaj al konscia manipulado de lingvo, se oni parolas pri la *Libro de maltrankvilo*, kiun mi tradukis kune kun mia kutima kuntradukanto Gabriel S. T. Sampol. La kreemo de Pessoa ne estas limigita al enhavo de tekstoj: la kodo mem iĝas objekto de lia kreiveco.

En 2014 vi editoris, ankaŭ kun Gabriel S. T. Sampol, la plenan verkaron de Blai Bonet, iom forgesita aŭtoro. Kial vi rekomendus liajn tekstojn?

Jes, kaj poste mi editoris du romanojn de Bonet (la lasta aperis ĉi-jare, *Míster Evasiô*). Blai Bonet verkis ĉefe poezion, sed ankaŭ kvin romanojn, taglibrojn kaj multe da ĵurnalaj artikoloj, kaj tion li faris dum kvindek kvin jaroj. Lia stilo adaptis sin al diversaj manieroj, kaj tamen funde de formo oni ĉiam trovas la samajn obsedojn pri la kontrasto inter vivo (biologie komprenita) kaj sociaj limoj kaj bremsoj, do finfine la bezono de libereco, ofte simbole esprimata per adoleskantaj personoj kaj voĉoj. Sendube bonaj tradukoj de Bonet bezonatas en la esperanta literaturo.

Vi kunverkis du anglalingvajn gramatikojn de la kataluna lingvo, aperintajn en la prestiĝa eldonejo Routledge, inter kiuj pasis 15 jaroj. Kio ŝanĝiĝis en la nova verko?

La lingvo mem ne multe ŝanĝiĝis inter ambaŭ gramatikoj aŭ, se ĝi ŝanĝiĝis samkiel ĉiuj vivantaj lingvoj ĉiutage ŝanĝiĝas, tiuj ŝanĝoj ne sufiĉis por pravigi bezonon de nova gramatiko. Tamen inter la gramatiko de 1999 (Wheeler, Yates & Dols 1999 *Catalan: a Comprehensive Grammar*) kaj tiu

de 2016 (Dols & Mansell *Catalan: an Essential Grammar*) la diferenco estas nia propra rigardo sur gramatiko. La dua estas pli praktika kaj proponas pri pragmatan analizon de lingvo. Mi multe lernis dum la verkado de la unua. Tion mi faris kune kun du veraj majstroj de la lingvo, ambaŭ britaj. Max W. Wheeler gvidis mian doktoran tezon, dum mi laboris en Britujo kun Alan Yates, katedrestro pri la kataluna en la Universitato de Sheffield. Mi multe lernis kun ambaŭ. Post jaroj, jam en Universitato de la Balearaj Insuloj, mi mem gvidis la doktoran tezon de Richard Mansell, brito kiu studis la katalunan. Fine ni verkis tiun duan gramatikon kune, kun mia sento ke eble mi estis malfermanta cirkon.

Ankaŭ poezion vi verkas: krom la nacilingva kolekto *Feliĉ* (2020), ankaŭ poemojn en E-o, pro kio vi premiigis en la Belartaj Konkursoj de UEA. Kial vi elektis la ĝenron poezio?

Poezio ĉiam ludas intense per la plej etaj eroj de lingvo. Jen kio plej allogas min: kiel lingvisto mi fakas pri fonologio. Eble se mi estus kuracisto mi emus labori pri ĉelbiologio, mi ne scias. Mi povas diri nur ke mi multe laboris pri teorio de silaboj en fonologio, kaj pro tio mi ankaŭ esploris pri poezia metriko. Eble ĉio tio povas klarigi mian preferon por poezio.

Tamen vi scias, ke la diskoniĝo de ies verkoj estas malpli granda, se ili estas en esperanto. Malgraŭ tio, vi elektis la internacian lingvon...

Ho, jes. Al mi ne gravas entute la kvanto da legantoj. Estas la verko mem kiel estetika propono kio tentas min. Krei en esperanto estis defio al mi, kaj tion mi faris post legado de multa poezio en ĉi tiu lingvo. Mi ja komprenas ke la esperanta literaturo estas kunfluo de multaj tradicioj malsamaj, kaj iam mi pensis ke eble mia propra tradicio iom mankis en ĝi. Jen

kial. Kaj mi devas tuj diri ke mi estas tre, tre malrapida verkisto. Mi havas aliajn celojn en mia listo antaŭ poezia verkado. Ekzemple, lingva analizo al mi estas pri alloga. Mi ne ĉion povas fari samtempe, kompreneble.

Feliĉ arigas poemojn verkitajn dum trideko da jaroj. Kian evoluon eblas konstati en viaj versaĵoj?

Ha! Tio estas interesa! Mi malrapide verkas... kaj eĉ pli malrapide publikigas. Mi trovis antaŭ nelonge mian eldoniston en Barcelono, surstrate. Ŝi demandis al mi ĉu mi havis novan manuskripton. Mi tuj respondis: "Kompreneble, almenaŭ du plenajn librojn, mi havas... sed ne nun: mi jam havis ilin kiam mi sendis al vi la unuan". Sed mi ne volas publikigi ilin, almenaŭ nun. Mi promesis ke mi lasos sufiĉe da tempo inter unu kaj la sekva (dek jarojn?). Mi malŝatas tiujn poetojn kiuj sentas pli fortan emon al publikigo ol al verkado. Unue, verki; poste, ripozi; trie, revizii multfoje; fine, se oni ne kapablas eviti tion, publikigi. Kaj por reviziado mi bezonas pensi ke la verko ne estas mia.

Tion mi diras, ĉar laŭ mi, teknike la tri partoj de la libro estas tute kompareblaj, nur eble unu post la alia la stilo iĝis iom pli libera, sed ne tute, ĉar finfine min ĉiam obsedis profesie ritmo kaj metriko. Eble pri la temo mi iom evoluis: la fina parto estas pli pensiga kaj solena ol la aliaj, pli sentoplenaj.

En la libro troviĝas poemoj kun konsiloj pri la vivo, laŭ longa tradicio kiu, en Okcidento, havas longajn radikojn. Kiu estas la ŝlosilo por kombini tion kun la *humilitas*, la aŭtora modesteco, sub kies signo naskiĝas via verkado, la libro mem?

La profunda konvinko ke poezio en mi estas flankokupo: jen la fonto de la poezia *humilitas* en mi. Mi ne ce-

las iĝi fama pro mia poezia verkado. Tio estas ne rekte komprenebla al junuloj kiuj komencas verki, kaj eĉ ankaŭ ne al pli aĝaj poetoj: ili pensas ke poezio estas maniero esprimi siajn sentojn. Jen la eraro, miaopinie. Mi ne esprimas miajn sentojn per poezio, sammaniere kiel roman-verkistoj ne esprimas siajn *sentojn*, sed ili utiligas romanojn por estetike rakonti. Kiam mi verkas poezion mi kreas. En *Feliĉ*, ekzemple, ĉio estas fikcio. Kial ne? Sincere, mi ne ŝatus suferi kiel la homo aperanta en kelkaj el miaj versoj, kaj sendube mi ankoraŭ ne sukcesis senti min tiel grandanime kiel sentas homo en aliaj versoj miaj.

Mi scias, ke por vi ritmo estas esenca en poezio, sed vi ĵus asertis, ke ankaŭ fonetiko, via alia pasio, gravas por vi dum verkado.

Jes, tie estas la fizika konekto inter ideo kaj voĉo. Mi ne povas eviti daŭre reveni al ĉi tiu punkto. Mi ne verkas por esprimi miajn sentojn: mi inventas sentojn por sperti tiun konekton. Versoj naskiĝas en mi kiel muziko: ritmo (ne nur silaba, ankaŭ koncepta), kaj poste mi serĉas la ideon per kiu mi povas vesti ilin.

La maro, Mediteraneo, la insulaneco, ĉu tio nepre palpeblas en versoj de majorkano?

Eble ne multe en miaj. Kiam la maro aperas en mia poezio, ĝi estas ĉiam idea. Mi neniam reagas poezie al fizikaj stimuloj: do, mi neniam priskribas realon.

Bonvolu rakonti, kiel disvolviĝas via verkado. Ĉu la poemoj venas, sin trudas, aŭ vi mem entreprenas la skribadon laŭplane?

Post alvenado de ritma elemento, mi komencas plani rakonton kiun mi povas

vas diri per versoj. Mi malofte verkas komponaĵon de unu dastro: mi ĉiam planas longan verkon kun diversaj partoj. Ekzemple, en mia esperanto-poezio: *Pasio*, *Denove*, aŭ tiu laste aperinta *Heroa rehejmiĝo*.

”

Ĉiam Kalocsay!,
ĉio troviĝas
en Kalocsay!

Kiujn poetojn vi ŝatas havi ĉemane, al kiuj poetoj vi ofte revenas?

Blai Bonet, kiun vi jam citis, Pessoa, Kavafis, do laŭ mi klasikuloj el la dudeka jarcento. Kaj el la esperanta tradicio, Kalocsay (ĉiam Kalocsay!, ĉio troviĝas en Kalocsay!), Miĥalski, Kurzens, Auld, Ragnarsson,... ĉu mi rajtas diri “ĉiujn”?

En tempo, kiam longe regas rompo de sintakso, forlaso de ritmaj strukturoj, en viaj versoj resonas fortaj influoj de latinaj kaj helenaj verkistoj. Ĉu pledo por reveni al klasikuloj?

Ne pledo, ne! Mi supozas ke ĉiu verkisto redonas tion kion li prenis el tradicio. Tiusence mi tute konsentas kun Eliot kaj lia ideo pri la transdonado de tradicio.

Vi estas religia persono, kaj tio sentebles ankaŭ en viaj verkoj. Kiel rolas kristanismo en via ĉiutaga vivo?

Kristanismo rolas trankvile en mia vivo. Ĝi estas mia maniero spiri, for

de ekstremismo, ĉiam malferma al novaj ideoj kaj aliaj manieroj senti kaj vidi vivon; mi tute respektas aliajn kredojn kaj malkredojn kaj interesiĝas pri ili. El la morala vidpunkto mi ĉiam estis komprenema kaj scivolema, eble, ĉar mia rilato al kristanismo estas ĉefe spirita, kaj laŭ mia kompreno ĉiu ajn formo de subpremo (ankaŭ religia) estas kontraŭkristana.

Kian eklezion vi ŝatus vidi en la venontaj jaroj?

Humilan, pacigantan, kompateman, korpuran, finfine beatecan, malriĉan en spirito. Tia estas mia ideala eklezio: malferma al ĉiaj manieroj pace vivi kaj ami, al ĝenra egaleco kaj al para egaleco (Al egaleco de ĉiuj specaj paroj? Al egaleco de ĉiuj specaj paroj kies membroj amas kaj respektas unu la alian, sendube, ĉio alia laŭ mia vidpunkto estas grava peko kontraŭ amo, do la ununura ekzistanta peko).

Ni revenu al beletro. Bonvolu paroli pri via percepto, via opinio rilate la nuntempan E-literaturon.

Mi ne kapablas fari tion. Mi bezonas perspektivon. Ĉu vi scias kion mi multe ŝatas? *Beletra Almanako*. Tion mi ne diras, ĉar mi scias ve vi apartenas al ĝia redaktora teamo, mi diras, ĉar mi pensas ke estas ege bone havi tian gazeton kie oni povas trovi diversajn stilojn kune, antaŭ ol trovi ilin en publikigitaj libroj.

Dankon, mi ĝojas. Laste, se mi diras “Andratx”, kio venas en vian menson?

Domo, familio, gefiloj, kamparo, arboj, maro, belaj sunsubiroj, homoj, parencoj, amikoj, amo, ĉio kio igas vivon travivebla. ■

L'ESTAQUIROT

Joan Inglada Roig
membre de KEA

A l'emissora RAC-1, al programa *Islàndia* d'Albert Om hi ha una secció dedicada als idiomes que es diu *El mètode Guitart amb Anna Guitart*. El passat 1r de desembre de 2021 s'hi presentà l'esperanto per iniciativa de Guillem Albà. Ell recordava que els seus pares el varen aprendre per actuar en un festival de titelles en esperanto, el 1981, a l'antiga Iugoslàvia.

La història comença quaranta anys abans a Vilanova i la Geltrú. A la Comparsa del Vidalot de l'any 1980, amb la Rambla plena a vessar, naixia la *Banda Puig*. Els components de *L'Estaquirot Teatre* hi tocaven diferents instruments –saxo, clarinet, tuba, percussió, etc.– i jo hi vaig tocar la trompeta a partir del 1981. Em van dir que els agradaria participar en el Festival Internacional de Titelles (Puppeteatre Internacia Festivalo -PIF), que se celebra anualment a Zagreb. Al PIF les obres s'havien de representar en esperanto i per això jo els vaig traduir l'espectacle *Tutilimundi* i els vaig fer un curs accelerat d'Esperanto a l'estiu. En Joan Moreto, membre de la Junta de l'Associació Catalana d'esperanto, s'oferí a revisar els textos i a supervisar la dicció dels membres del grup, cosa que els permeté actuar adequadament.

I a l'octubre del 1981 *L'Estaquirot Teatre*, compost per l'Olga, el Bertu, el



Lluís, el Pau, el Lluisma, la Pilar i jo mateix, vam participar en el 14è Festival Internacional de Titelles en Esperanto de Zagreb.

El darrer dia es van repartir els premis que els jurats internacionals corresponents van atorgar. Al grup *L'Estaquirot* li van donar el premi per “la sukcesa provo revenigi la pupojn al la fontoj de eŭropa pupismo” (l'intent reeixit de retornar els titelles a les fonts titellaires europees).

Jo vaig participar en el Festival com un actor més del grup i em van donar

el premi al “pupisto kiu plej bone parolas Esperanton ekster la scenejo” (titellaire que millor parla l'esperanto fora de l'escenari).

L'actuació de *L'Estaquirot Teatre* els va agradar tant que els van organitzar una gira per Croàcia per al maig de l'any següent. Com que jo no podia absentar-me del meu lloc de treball, em va substituir l'actor Toni Albà. Per poder-ho fer va seguir el curs accelerat d'esperanto.

En aquells moments el PIF estava organitzat per Internacia Kultura Servo



(Servei de Cultura Internacional) i el seu director era Zlatko Tišljár (1945-2020), que va participar en el Congrés Català d'Esperanto de Barcelona del 2011. La secretària era Spomenka Štimec, que va ser la nostra acompanyant durant tot el festival. Jo la vaig acompanyar en "representació" dels titellaires a una reunió a l'Ajuntament de Zagreb.

El PIF va ser fundat el 1968 pel SEK-Studenta Esperanto-Klubo (Club Esperantista d'Estudiants) i va tenir un clima esperantista des dels seus inicis fins a finals dels anys vuitanta. Se celebra anualment des de 1968 a Zagreb i Velika Gorica. La idea del festival va ser de Tibor Sekelj, i va ser realitzada per Roger Imbert i Zlatko Tišljár, president de l'Associació Juvenil Es-

perantista de Iugoslàvia, posterior iniciador i director de l'IKS-Inter-nacia Kultura Servo (Servei Cultural Internacional). Des del 1972 el PIF va estar liderat per la recentment fundada l'IKS, que també va col·laborar amb la Kroata Esperanto-Ligo (Lliga Esperantista Croata). A més de difondre l'esperanto, també promovia edicions i una gran varietat d'activitats culturals. El programa del PIF estava en gran part en esperanto mentre la secretària del festival va ser Spomenka Štimec (fins al 1988). L'esperanto també era la llengua oficial del festival.

El nom PIF ha arribat fins als nostres dies, encara que molts ja no en saben el significat.

A les darreries de la dècada de 1980, els components de l'IKS van canviar i l'entitat va perdre el seu caràcter esperantista. A la dècada de 1990, el nou director de l'IKS no era un parlant esperantista, i les activitats d'esperanto van anar cessant gradualment. Des del 2013 l'IKS va canviar de nom a: Kultura Center Travno. De totes maneres, el festival PIF va continuar

sense interrupcions. El 2016 ja es va celebrar el 49è festival, però l'esperanto ja no s'hi va utilitzar. L'any 2008 es va publicar el llibre dedicat als 40 anys del PIF (fotos, cronologia, llistes, premis, repertori, memòries, articles periodístics, etc.) en versió trilingüe: anglès, esperanto, croat i amb traducció de Lucija Borčić.

El nom PIF i el premi *Tibor Sekelj* es mantenen en el catàleg de cada any. Al web actual (<https://www.pif.hr>) hi ha anunciat el festival d'enguany, el 55è PIF (2022). Hi podem llegir en anglès i en croat la història del PIF, i com a curiositat traduïm que "PIF no es va quedar a Zagreb. Ha viatjat a Sisak, Varazdin, Karlovac, Pula i Ljubljana a Eslovènia, igual com a l'extrem nord en dues ocasions quan va anar a Tromsø, a Noruega, la ciutat bessona de Zagreb. Malauradament, la distància geogràfica era massa gran perquè les reunions celebrades el 1978 i el 1981 esdevinguessin una forma permanent de cooperació. En els 53 anys del festival hi han participat més de 920 grups de més de 53 països de tots els continents." ■

Trovu vian deziratan libron en la libroservo de KEA

libroservo@esperanto.cat

EL LLEGAT DE LA FRATERNITAT UNIVERSAL

Xavi Alcalde
Polítòleg



El passat 21 de juny de 2022 va tenir lloc a la Facultat de Geografia i Història de la Universitat de Barcelona la taula rodona *El llegat de la fraternitat universal. Canvi i continuïtat en el moviment esperantista*. Formava part del II Congrés Internacional organitzat per la secció d'Història Contemporània d'aquesta facultat i girava entorn de les *Herències*. En 2025 es celebrarà la tercera edició d'aquests congressos. En total van participar-hi unes 200 persones, en 23 taules diferents. Amb 11 ponents, la taula esperantista va ser una de les més nombroses.

La taula es va organitzar en dues parts. En primer lloc, el veterà historiador local Serafín Aldecoa va parlar sobre la implantació de l'esperanto entre les elits culturals de Terol. Aldecoa és autor del llibre *Esperanto y esperantistas de Teruel*, publicat el 2021. A continuació ho va fer Héctor Vicente, que enguany ha defensat la seva tesi a la Universitat de Saragossa sobre l'Ajuntament republicà en aquesta ciutat. La seva comunicació tractava justament sobre un dels regidors, l'esperantista

Manuel Maynar. Per la seva banda, Roberto Garvía va incidir en la diversitat del moviment esperantista a Espanya fins a la Guerra Civil. Garvía és catedràtic de sociologia a la Universitat Carlos III de Madrid i autor de diverses obres fonamentals sobre el moviment esperantista. Posteriorment va presentar la seva recerca la doctoranda a la Universitat de Saint Andrews (Escòcia) Pilar Requejo: "Esperanto i nacionalisme a la península Ibèrica: Espanya, Catalunya i Portugal". A continuació Eric Macpherson va proposar una conceptualització teòrica sobre l'acollida dels nens austríacs després de la Gran Guerra. I finalment, qui signa aquest text (i coordinador de la taula) va exposar el tema dels esperantistes a les Brigades Internacionals.

Després de la pausa, la segona part va tractar sobre la relació entre l'esperanto i una sèrie d'ideologies i/o moviments socials i/o polítics, que investiguen un grup d'acadèmics de la Universitat de Parma: els rotaris, a partir de l'associació *Rotaria Amikaro De Esperanto* (Davide Astori); els

maçons, fent referència a Mario Dazzini (Nicola Reggiani); els bahá'í, amb l'exemple d'Alessandro Bausani (la xerrada d'Anna Mazza, que estava programada finalment no va tenir lloc); el socialisme, a partir d'Angelo Filippetti (Giovanni di Stefano); i el feixisme, amb el cas de Radio Roma (Matteo Cloriti). El contrapunt amb l'actualitat, pel que fa a la joventut brasilera esperantista, el va posar la doctoranda a la Universitat de Saint Andrews i membre activa de TEJO Manuela Burghlelea.


Una de les qüestions que va generar més discussió, tant a la primera com a la segona part de la sessió, va ser fins a quin punt es pot considerar que l'esperantisme és quelcom d'esquerres o de dretes. El debat fou passivament poliglota (cadascú parlava en la seva llengua): català, castellà, esperanto, una mica d'anglès... i molt d'italià. Cal destacar la presència de diversos membres de KEA i també de l'esperantista i professor convidat de ciències polítiques a la Universitat Pompeu Fabra, Michele Gazzola, molt actius al debat. ■

KRUCVORTENIGMO: ADJEKTIVOJ

Pedro M. Martín Burutxaga

Lingvemulo

Hodiaŭ mi proponas krucvortenigmon. Ne timu, ĝi estas tre facila. Praktiku kaj ĝuu:



HORIZONTALALE:

1. Adjektivo 2. Vokalo. Vokalo. Simbolo de fosforo. Aŭstralia bestet'. 3. Ŝipo de kapitano Nemo. Konsonanto. 4. Hispane: komanda voĉo. Konsonanto. Prepozicio. Simbolo de protaktinio. 5. Adjektivo. Simbolo de rutenio. 6. Du vokaloj. Du vokaloj, denove. Adjektivo. 7. Simbolo de kalio. Adjektivo. Konsonanto. 8. Adjektivo. 9. Adjektivo. Simbolo de oksigeno. Bulb' kun fortaj gusto kaj odoro. 10. Adjektivo. Loko. Negacio.

VERTIKALE:

1. Tridek tagoj. Numeralo. 2. Finaĵo de ordono. Tereno, surfaco. Amfibi'. 3. Prepozicio. Konsonanto. Adjektivo. 4. Konsonanto. Kava, malplena spaco. Simbolo de natrio. 5. Katalune: vestaĵo protektanta kontraŭ virusoj. Laŭta son' eligita dum la dormo. Vokalo. 6. Konsonanto. Virina nomo. Produktoj de kokinoj. 7. Vida organ'. Kvin kaj ses. Vokalo. 8. Helpokrio. Adjektivo. 9. Simbolo de taltalo. Adjektiv'. Vorteto esprimanta nedefinitecon. 10. Adjektivo. Prepozicio. Franca artikolo.

(solvo sur paĝo 40)

ASOCIA AGADO DE KEA

Alfons Tur Garcia

membro de KEA kaj denaska esperantisto



JAM OKAZINTAJ

Post pandemiaj jaroj, nuligoj kaj hezitoj la estraro de KEA decidis okazigi la 39an katalunan kongreson en Castelldefels inter la 3a kaj la 6a de junio. La decido montriĝis trafa. Bonega LKK, kies animo estis Sílvia Soler, en harmonia kunlaboro kun la estraro ebligis kongreson kiun ni povas konsideri plene sukcesa.

La programo estis bunta, la kongresejo disponigita de la municipo estis agrabla, komforta kaj facile alirebla por la pli ol cento da aliĝintoj. Krom la ĉeesto en kursoj aŭ prelegoj eblis simpla ripozado aŭ klaĉado en la kongresejo mem aŭ en la apuda placo. Ankaŭ menciendas ke diversaj eroj okazis ekster la kongresejo, kiel la vizitoj al la kastelo kaj al Olla del Rei, aŭ la nokta koncerto.

La teknika evoluo (kaj la kapablo kaj sindediĉo de Enric Pineda) permesis ke tiu estis la unua kataluna kongreso

de Esperanto rekte registrita kaj enretigita!

Se vi maltrafis la kongreson, en la jena revu-numero vi trovos diversajn artikolojn de kelkaj el la kontribuintoj kiuj helpas vin iom gustumi la aferon, sed ni devas bedaŭrinde informi ke la kongresa etoso ne estas redonebla, tial ni varme instigas vin nepre ne manki la 40an kongreson okazonta en...ankoraŭ decidotaj loko kaj dato.

Tamen ni povas ĝoje aserti ke la asocia agado de KEA kaj KEJ ne ĉesis antaŭ kaj post la kongreso mem. Jen skiza resumo:

En majo okazis oficiala kurso de Esperanto en Universitat Pompeu Fabra organizita kaj gvidita de Jordi Calafí. Trideko da homoj partoprenis ĝin kaj ekzameniĝis por ricevi ateston de baza nivelo. Dum la kurso okazis prelego de finna esperantisto kaj

reteaj babiladoj kun iranaj kaj koreaj esperantistoj ebligis al la kursanoj konstati la vivantecon de la lingvo kaj ĝian tutmondecon.

La eldona fako, sub la respondeco de Carles Vela, plu donas siajn fruktojn. Laste aperis la tria numero de la du-lingva kolekto Jaume Grau Casas, *Antologia de Solitud i altres relats/ Antologio de Soleco kaj aliaj rakontoj*, dum aliaj verkoj estas prilaborataj kaj publikigotaj.

La 16an de junio, nur kelkajn tagojn post la kongreso, la magistrato de Sabadell invitis delegacion de CES/KEA partopreni la memorigan solenaĵon pri la 25-jariĝo de la rilatoj inter Sabadell kaj Sarajevo.

Denove nia asocio ricevis oficialan inviton de la urbo Sabadell. Ĉi-foje temis pri partopreno en la flor-ofero en Parko Catalunya okaze de la kataluna nacia tago, la 11an de septembro.

La nacia tago estis abunda en aktivado, ĉar KEA starigis budon en la asocia foiro organizita de Òmnium Cultural en la aleo Lluís Companys en Barcelono. Tie ĉefe KEJ-anoj informis la preterpasantojn pri Esperanto kaj lingvaj rajtoj.

Ne hazarde la nacia tago estis rimarkinda ankaŭ por nia asocio, ĉar post longa teknika laboro, sennombraj problemoj kaj diversaj komplikajoj fine KEA havas novan retpaĝaron! La nuna konservas strukturon similan al la antaŭa sed ĝi estis plibonigita kaj aktualigita. Se vi ankoraŭ ne vizitis ĝin, ne hezitu kaj ĝuu ĝian novan fasonon. ■

OKAZONTAJ

Pri la venontaj okazaĵoj ni povas jam anonci la jenajn:

- La 26an de novembro, sabaton, okazos KER ekzamenoj en la niveloj B1, B2, C1 kaj C2 ĉe Centro de Esperanto Sabadell, sidejo de KEA.
- Dimanĉon la 27an de novembro okazos prezento de Esperanto kaj vingustumado en Subirats kadre de la ĉiujara aranĝo Subirats "Tasta'l"!
- La ĉi-jara Zamenhof-tago estas pretigata. La programo ne estas findecidita, sed la lokoj kaj datoj jes. Ni atendas vin la 16an de decembro en Barcelono (Espai Vilaweb) kaj la 17an de decembro denove en Subirats.

Nepre revizitu regule la novan hejmpaĝon de KEA. Tie vi povos regule informiĝi pri la asocia agado. ■

CRÒNICA DEL CONGRÉS DE CASTELLDEFELS

Alfons Tur Garcia

membre de KEA i *denaska esperantisto*



A la nit, a la plaça de l'Ajuntament un concert de Kaj Tiel Plu obert a tothom, congressistes i vilatans, va fer les delícies dels assistents i dels passavolants.

MON CARDONA

Finalment, cinc anys després del congrés d'Àger, passades la pandèmia, confinaments i mascaretes que van anar ajornant activitats de tota mena, KEA va poder organitzar, amb un cert retard, el seu 39è congrés, aquest cop a Castelldefels. Ajudats pel bon temps, que ens va respectar durant tot els dies, vam tenir el suport del consistori, que cal agrair i que va fer possible un esdeveniment reeixit amb un tema punyent, la biodiversitat lingüística.

El LKK el presidia la nostra estimada M^a Josep Udina i l'integraven Sílvia Soler i Laura Muñoz com a membres veritablement locals, juntament amb diversos membres de la Junta de KEA. Cal fer un especial esment a Sílvia Soler, que va ser l'ànima de l'organització; els seus entusiasme i dedicació van fer possible un congrés del qual ens podem sentir molt satisfets.

”

Una guerrilla de *pacaj batalantoj* ens vàrem repartir des del 3 fins al 6 de juny per la vila de Castelldefels: atacant el Castell que dóna nom a la ciutat, trepitjant l'Olla del Rei, ocupant la masia Can Roca de Baix i la biblioteca que duu el nom de l'insigne Ramon Fernàndez Jurado, fent incursions nocturnes a places i patis...

Malgrat alguna cancel·lació de darrera hora i els petits canvis que va caldre fer durant el propi congrés, es va poder dur a terme el programa tal i com s'havia previst. Com una guerrilla de *pacaj batalantoj* ens vàrem repartir des del 3 fins al 6 de juny per la vila de Castelldefels: atacant el Castell que dóna nom a la ciutat, trepitjant l'Olla del Rei, ocupant la masia Can Roca de Baix i la biblioteca que duu el nom de l'insigne Ramon Fernàndez Jurado, fent incursions nocturnes a places i patis...

Divendres ens vàrem aplegar a l'*Interkona vespero* que, com passa als *Universalaj Kongresoj*, algú va proposar que se'n diguessin *Inter(re)kona vespero*, car sovint és una trobada de vells amis, coneguts i saludats.

Dissabte, a primera hora va tenir lloc la inauguració oficial amb les autoritats locals i de l'associació. A partir



SEBASTIÀ RIBES

El LKK el presidia la nostra estimada M^a Josep Udina i l'integraven Sílvia Soler i Laura Muñoz com a membres veritablement locals, juntament amb diversos membres de la Junta de KEA.

d'aquí el centenar llarg de congressistes es va anar repartint pel curs d'esperanto, la visita al castell i un grapat de conferències i xerrades de personatges tan insignes com Carme Junyent i Nicolau Dols, entre d'altres.

Havent dinat (o no) les activitats es van reprendre; conferència d'Istvan Ertl, presentació de TEJO per al jovent, una presentació de la darrera edició de KEA per als més lletraferits i per rematar-ho una taula rodona amb Nicolau Dols i Lluís de Yzaguirre en un dia centrat en l'aspecte lingüístic de la diversitat. A la nit, a la plaça de l'Ajuntament un concert de Kaj Tiel Plu obert a tothom, congressistes i vilatans, va fer les delícies dels assistents i dels *lokaj preterpasantoj*.

Diumenge, Sant Tornem-hi. Al dematí noves presentacions, xerrades, lliçons de diversos temes i en diverses

llengües, des del català a l'esperanto, passant per l'aragonès fins i tot. La tarda va estar centrada en un homenatge, repartit per diversos indrets de la vila, a en Ramon Fernández Jurado: activista polític, esperantista, poeta i tothora un home compromès i fidel als seus ideals de progrés. Durant la nit va tenir lloc l'*Arta vespero*, que es va repartir entre el Pati de la República per als amants de la ballaruga i el propi *Kongresejo* per a la resta.

Dilluns va ser un dia centrat fonamentalment en l'aspecte de la biodiversitat i per això les activitats van tenir lloc al Campus de la UPC a Castellet i amb una visita a l'Olla del Rei. Al migdia es va fer el dinar de germanor i encara es va poder gaudir d'alguns actes més abans de la cloenda.

Cal no oblidar que al llarg de tot el congrés va romandre obert el *Libro-*

servo, on es podia triar entre un bon nombre de diversos llibres, des de les darreres edicions a les que duen temps a les lleixes esperant un esperantista lector.

Si aquest resum fet a corre-cuita us ha despertat l'interès, per primer cop la tecnologia (i la dedicació d'Enric Pineda) ha fet possible que bona part del congrés hagi estat enregistrada i està penjada al web de KEA, on trobareu els enllaços per poder (re)veure i/o reviure el 39è congrés, si més no aquelles parts que poden sortir per la petita pantalla...

Assolits els nostres objectius ens hem retirat al cau d'hivern a preparar la nostra propera malifeta congressual. Encara està per veure on i quan, però no patiu que segur que tornarem! ■

LASTA AGADO DE KEJ



JUNULARA ETOSO EN LA KATALUNA KONGRESO

Jordi Calafí Franquesa

Post longa pandemio, ne necesas diri, ke ni junuloj devis renkontiĝi denove kaj ĝui kelkajn tagojn kune kaj fizike. Jam pasis 5 jaroj de la lasta kataluna kongreso kaj feliĉe eblis organizi aranĝon, kiu plenumis atendojn.

Ĉi-foje temis pri Castelldefels, bonlokita urbo: marborda, proksima al la ĉefurbo kaj kun bonveniga centro. La kongres-instalaĵoj estis nesuperblaj, tute taŭgaj por la diversaj okazintaj aktivaĵoj: babiladoj (kun luksaj

prelegantoj kiel Jorge Pueyo, Carme Junyent, Nicolau Dols, István Ertl...), koncertoj, ateliéroj, ekskursoj kaj Esperanto-kursoj por tiuj kiuj volis lerni la lingvon. Oni devas rimarki la sukcesan aliĝon de junuloj, tre mankantaj dum antaŭaj jaroj. Junuloj ne nur el Katalunio sed el ankaŭ aliaj mondopartoj (Francio, Irlando, Filipinoj, Italio, Okcitanio, Rumanio...) povis ĝui kelkajn tagojn por paroli, ridi, eliri, manĝi... esperante.

La rezulto estis sukcesa en la senco, ke KEJ povis krei junan programon samtempe kun la Kataluna Esperanto-Kongreso. Ni devas menciigi la sukceson, kiu estis, kaj la kontentigon ricevitajn de tiuj, kiuj vizitis nin el eksterlando, kaj pruvo de tio estas la partopreno de la nuna prezidanto de TEJO Albert Stalin (tiam vicprezidanto) kaj la TEJO-volontulino Livia.

Ĝi estis defio, kiu transpasis niajn limojn kaj kreis deziron partopreni en KEJ-aranĝoj kaj viziti nian hejmon! ■

VIZITO AL HERZBERG AM HARZ, LA ESPERANTO-URBO DE GERMANIO

Isaac Giménez Castro

Se la demando estas: “ĉu vi rekomendas al mi iri al la Esperanto-urbo?” La respondo estos ĉiam: “jes!”

Antaŭ pli ol unu monato, mi vizitis kun miaj gepatroj kaj mia fratino Herzberg am Harz. La Esperanta urbo de Germanio estas malgranda, sed tre bela. Mi aŭdis, ke en tia urbo la stratsignoj estas skribitaj kaj en la germana kaj ankaŭ en Esperanto, kaj ke la homoj ofte konas la esperantan lingvon.

Mi ankoraŭ ne tre bone regas Esperanton, ne scias multe da esperanto. Mi lernas. Sed mi volas paroli bonege. Tial mi serĉas lokojn por praktiki la lingvon kaj por koni novajn aferojn pri Esperanto. Mi trovis Herzberg am Harz, en Germanio. Mi estis ege bonŝanca.

Tie estas la Esperanto-Centro, kiu estas la plej grava loko de Esperanto en la areo. La homoj, kiuj loĝas tie, estas vere mojosaj. Sen ili, mi sciis nenion. Ili montris al mi kaj al mia familio la tutan urbon kaj la plej gravajn lokojn el la historio de Herzberg am Harz. Grandioza, mirinda tago. Senpage kaj afable, nur por ni, ili donacis al ni librojn, dokumentojn kaj revuojn el la biblioteko, kiun ili kreis solaj, kun multe da informoj. Ili ankaŭ akompanis kaj gvidis nin en sia aŭto ĉirkaŭ la urbo.

Mi estas tre kontenta, ĉar mi povis praktiki Esperanton kaj lerni multe. Mi devas diri, ke la sperto estis bonega kaj mi vere pensas, ke se mi povas, mi revenos. La vojaĝo estas ege rekomendinda. Ĉio valoris por mi!! ■



PARTOPRENO DE KEJ-ANOJ EN LA UNUA ESPERANTO-MUZIKALO

Lucía Montserrat Fernández Barrera

La premiero de la muzikalo “June kaj Kune” ĉe la IJK en Nederlando estis granda sukceso kaj havis 7 KEJ-anojn kiuj ludis diversajn rolojn: ili estis aktoroj, koruso, filmisto...

La sperto estis amuza kaj riĉiga dum la tuta procezo: kaj dum la provludoj kiuj okazis laŭlonge de la semajno kaj dum la fina prezentado.

Estis bonega okazo renkonti homojn dividantajn nian amon al la muziko (kun improvizitaj momentoj inter provludoj, kiam iu aperigis ukulelon kaj ni kantis). Krome, estis agrable

vidi kiel la gejunuloj mem organizis kaj direktis la provludojn kaj la muzikalon. Ni kreis dinamikon, laŭ kiu oni povis kunhavigi ideojn kaj fari pli bonan spektaklon.

La muziko konsistis el konataj kantoj, kies tekstoj estis ŝanĝitaj, kaj tiu “adaptado” al Esperanto fine donis tre bonan rezulton, kun amuza lingvaĵo kaj esperantaj temoj. Ĝi estis tre bona sperto kun Esperanto kaj sur persona nivelo kaj sur pli komunuma nivelo, ĉar ĝi persone helpis min perfektigi la lingvon kaj praktiki ĝin en tre malsama medio ol ĝi estas kutime uzata, kaj tio estas tre mojosa. ■

JEN LA UNUA ĈEESTA IJK POST LA PANDEMIO!

Noa Uclés Aymamí



Ĉi-jare IJK okazis en la bela Nederlando. “Kio estas IJK?”, vi demandos, do ĝi estas la Internacia Junulara Kongreso pri Esperanto. Tien oni iras por paroli en Esperanto kaj fari multajn aktivaĵojn: kursojn pri la lingvo, seminariojn pri la mondo, ankaŭ diversajn kursojn de dancado, pentrado,... aŭ vi povas ankaŭ ekskursi kaj malkovri la landon kien vi vojaĝis. Dum la ĉi-jara IJK ofte okazis bicikladoj, ĉar Nederlando estas lando de biciklistoj. Dum ĉiuj noktoj vi povas danci en la Diskejo, drinki en la Trinkejo kaj iri al Gufujo.

Tie vi povas trinki teon kaj kunparoli kun la multaj diversaj homoj en la renkontiĝo.

En IJK 2022 ĉiun nokton sonis unu tipo de muziko. Ekzemple, la unuan nokton sonis Nederlanda muziko, la duan nokton estis elektronika muziko, kaj ankaŭ oni povis festi la latinecan nokton kaj la nokton pri la planedo. Multaj artistoj kantas aŭ ludas en koncertoj, kaj estas bona okazo por kanti kaj danci en Esperanto, ĉar tiu bela lingvo ankaŭ povas esti kantita! Ĝis la venonta IJK!! ■

KIEL PASIS LA TREJNADO POR NOVAJ TREJNISTOJ EN OKCITANIO?

Òscar Hernández Rodríguez

Ne malofte oni asertas ke Esperanto efektive ne estas pli ol tempopasigilo. Tamen, simpla rigardeto al nia movado kaj al la agado de entuziasmaj junuloj sufiĉas por senpene disfaligi tiun miton. La projekto “Trejnu novajn Trejnistojn” (TnT) estas certe unu el la iniciatoj kiuj plej klare montras, ke ankaŭ en Esperantujo kaj pere de Esperanto oni povas akiri konkretajn kapablojn utilajn en pluraj flankoj de la vivo, kreski kiel persono kaj spertiĝi.

TnT, ĉi-jare organizita de JEFO (Junulara Esperanta Franca Organizo) kaj subvenciita de la Konsilio de Eŭropo, okazis dum dek varmaj juniaj tagoj en la sopirige belaj urbetoj Moissac kaj Arrot, en Okcitanio. Tie, grupo da lernemaj junuloj, inter kiuj troviĝis la KEJ-anoj Òscar kaj Manu, estis funde trejnitaj pri neformala edukado, cele al akiro de ĉiuj necesaj kapabloj por fariĝi trejnistoj. Dum la lastaj du tagoj de la projekto la partoprenantoj devis liveri sian unuan trejnadeton, aplikante ĉion lernitan: ili devis kunlabori kun la aliaj kolegoj, filtri kaj aranĝi serĉatajn informojn, ekzerci sian kreemon por elpensi atentokaptajn kaj partoprenigajn aktivaĵojn, kaj fine apliki ĉiun lernitan teknikon pri voĉregado, gestado kaj korpa pozo (kiujn, parenteze, instruis la KEJ-ano Michael Boris).

Tiuj freŝbakitaj trejnistoj nun jam pretas entuziasme trejni en Esperanta medio pri plej diversaj temoj. Fakte, Manu jam havis ŝancon travivi sian unuan sperton kiel trejnisto en seminario pri lingvaj rajtoj dum IJK!

Nun do estas via vico: KEJ-ano, ne malesperu se vi maltrafis la ĉi-jaran TnT-n, ĉar venontsomere verŝajne venos ja por vi ŝanco, kaj eble pli proksime ol vi imagas. ■

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO DE PAĜO 32

1	M	O	N	A	T	O		T	R	A									
2	U		A	R	E	O													
3	L	A	Ŭ		R			K	A	R	A								
4	T		T	R	U	O			N	K	A								
5	E	P	I		R	O													
6	K			L	E	A			O	V	I	O							
7	O	K	U	S				V	V										
8	S	O	A					R	E	A	L	A							
9	T					P		U											
10	A	L	T	A															

SPERTO ĈE LA INTERNACIA ESPERANTO-KORUSO EN EŬSKIO

Pol Jiménez Isach

La pasintan 17an de septembro la Internacia Esperanto-Koruso partoprenis en la paca festivalo organizita de Unesko en Tolosa, Eŭskio. Ni renkontiĝis tie du tagojn antaŭ la festivalo por kune ekzerci kaj kunhavigi la repertuaron.

La 17an, kun ĉiuj pecoj ekzercitaj kaj pretaj, ni kantis en la festival-koncerto, en kiu ni aldoniĝis al tri pliaj prestiĝaj korusoj, el Madrido, Eŭskio kaj Kolombio. Krome, unu el la junaj esperantistoj partoprenis en la ronda tablo okazinta dum la festivalo por diskuti pri paco, tiel reprezentante la esperantistaron.

La koncerto estis plena sukceso, ĉar ni povis kanti konatajn, tradiciajn kantojn, kiuj parolas pri paco, tradukitajn en Esperanton, krom la bela Esperanta himno “La Espero”, verkita de Zamenhof mem.

Ne ĉio estis nur kantado! Post kiam la festivalo finiĝis kaj antaŭ ol ni ĉiuj devis hejmeniri, ni povis ĝui viziton al la urbo, ekscianta pri la eŭska historio kaj kulturo danke al Nikolas, esperantisto kiu loĝas en Tolosa. ■



ĜUINDA SPERTO EN LA IJK-SEMINARIO

Jordi Solsona Sanjuan

Minoritataj lingvoj, aŭ ĉu ni devus diri “minoratigitaj lingvoj”? Pri tio ĉi ni povis lerni ĉe la trejnado „Lingvoj kaj Demokratio” dum ĉi-jara IJK en Nederlando. Tribaj lingvoj, lingvoj neoficialaj de regionoj, lingvoj de grupoj migrintaj..., ĉiuj ili, lingvoj en grandaj ŝtatoj kiuj ne agnoskas al ili samajn rajtojn esti uzataj.



Dum la IJK, danke al niaj famaj instruistoj kaj amikoj Karlos Pesquera, Michael Boris Mandirola kaj Manu González, ni povis lerni kiel la ŝtatoj tra la mondo rilatas al siaj internaj lingvoj. Multaj diskriminacioj ĉie okazas: La plimulto da ŝtatoj pro iu aŭ alia kialo ne deziras agnoski la samajn rajtojn al ĉiuj lingvoj parolataj en siaj landoj, sed kiujn rezultojn tio havas? La neagnoskado de la oficialeco aŭ eĉ la malpermeso de la uzado de lingvoj kaŭzas sendefendecon ĉe la ŝtataj tribunaloj, morton de riĉegaj kulturoj kaj de la nacia identeco de popoloj. Neoficialeco kaŭzas ke la malplimultuloj mem ne rigardas siajn lingvojn kiel utilajn, kaj malkreskigas la sciencon, literaturan kaj kulturalan produktadon en tiuj lingvoj.

Verŝajne, ni katalunoj povas eble rilati kun ili almenaŭ historie, kaj ankaŭ nuntempe. Sendube ni devas antaŭeniri al mondo sen diskriminacia, pli justa kaj pli bona por ni ĉiuj. Ĉu Esperanto helpus? ■

VIZITO AL LA CENTRA OFICEJO DE UEA KAJ ESTRARANIĜO AL TEJO

David Ruíz Sánchez

Je la fino de julio la nova estraro de TEJO por la mandato 2022/2023 elektigis. Tiel, danke al eksaj kaj novaj estraranoj de TEJO, oni havis la saĝan ideon okazigi Transdonan Estrarkunsidon tuj post la fino de la ĉijara IJK – dum oni ankoraŭ suferis la postsekvojn de la fama ebriĝo de la lasta nokto – en la bela Roterdamo!

Je nia alveno ni estis gastigitaj de la TEJO-volontuloj en la Volontula Domo. Ni restis tie dum du noktoj, ĉar ni profitis la proksimecon de tiu ĉi tre kurioza kaj alternativa konstruaĵo je 10-minuta distanco piedire de la Centra Oficejo de UEA.

Lasinte la valizojn ni tuj okazigis en la CO buntajn kunvenojn kaj retkunvenojn kun la novaj kaj eksaj estrar-

anoj, oni transdonis sciojn al la novaj estraranoj kaj detaligis internajn kutimojn por certigi la glatan funkciadon de la nova estraro de TEJO.

Tamen ne ĉio estis movadumaĵoj, ni profitis la oportunon por turismi tra la urbo, piedirante tra ĝiaj novaj kaj malnovaj konstruaĵoj, kanaloj kaj nekredeblaj pontoj; kaj ni ĝuis ankaŭ tipajn bongustaĵojn de Nederlando... –verdire ne– en surinamaj kaj afrikaj restoracioj!

Vere estis granda plezuro por mi viziti kaj labori por TEJO en la Centra Oficejo de UEA, granda konstruaĵo plenplena de historio en ĝiaj ĉambroj kaj kun kerna rolo en la internacia movado ekde jam pli ol duonjarcento. ■

Ser soci de KEJ té **molts avantatges**

Per només 26€ l'any (o 2.16€ al mes)

O sigues soci passiu de forma completament gratuïta!

	No Socis	Socis passius	Socis actius
Participar en les trobades i actes oberts de l'associació	★	★	★
Estar informat mitjançant les nostres xarxes socials de les activitats de KEJ	★	★	★
Ser informat de forma directa de les activitats de KEJ	★	★	★
Estar en contacte amb joves esperantistes d'arreu dels PPCC de KEJ	★	★	★
Poder assistir a les assemblees de KEJ amb dret a veu	★	★	★
Rebre descomptes en congressos i trobades internacionals	★	★	★
Possibilitat de gaudir de projectes ERASMUS+ i de subvencions a l'estranger	★	★	★
Poder assistir amb vot a les assemblees de KEJ	★	★	★
Presentar-se com a candidat a la Junta Directiva de KEJ	★	★	★



#JUNULOJ

SINDONEMA VILAĜO

Viktoro Solé

muzikinstruisto

Vilaĝo Esperanto eble estas pli evoluinta socio. Tie oni renkontiĝas kun pli da vegetaranoj, veganoj, informatikuloj, lingvistikuloj, poliglotoj, transgenuloj kaj instruistoj ol en naciaj medioj. Malgraŭ ke ni esperantistoj tre ŝatas diskutadi kaj kvereli pri ĉio kaj nenio (ĉu *ita* aŭ *ata*, ĉu *Italio* aŭ *Italujo*, ĉu *malbona* aŭ *mava*, ktp.) eble ni ĝenerale estas pli toleremaj ol la averaĝaj homoj ekster esperantaj rondoj. Kompreneble putra pomo ekzistas ie ajn, sed en esperantaj aranĝoj kutime oni ĝuas etoson bonan, amikan kaj riĉigan. Verkemuloj, ĵonglemuloj, ludemuloj kaj muzikemuloj tre abundas kaj vere plibonigas niajn renkontiĝojn.

Laŭ mia percepto esperantistoj estas pli afablaj, pli malfermaj, kaj tio signifas, ke en komunaj manĝoj, ekzemple, oni regule dividas tablon kun nekonatoj (“ĉu mi rajtas sidi kun vi?”), kaj la konversacioj inter samtablanoj el malsamaj devenoj ofte montriĝas ege interesaj. Eĉ niaj gravuloj estas ĝenerale facile atingeblaj. Kion diri pri bierumado aŭ teumado? Oni povas elekti inter bruemaj trinkejoj aŭ trankvilaj gufujoj por babili pri io ajn, sed, de tempo al tempo, kompreneble, oni devas interrompi la fadenon por interkrampe paroli metalingve pri dubinda vorto aŭ ĵus forfluginta akuzativo. Joan Clos, esperantisto el Penedès, iam bierumante proklamis: “Esperantisto estas la ununura besto, kiu trinkante konsultas vortaron” kaj la tuta rondo ridegis jesante. Antaŭe

”

La plejparto el la instruistoj instruas senenspeze, la verkistoj ne sonĝas ricevi eĉ groŝon pro sia enorma laboro, la armeo de volontuloj, kiuj organizas kaj helpas en kongresoj kaj renkontiĝoj, estas multnombra kaj tiuj pacaj batalantoj malavare dediĉas sian tempon por ni ĉiuj

ni kunportis ĉiam la malnovan vortareton de Paluzie, sed nuntempe poŝtelefono jam sufiĉas.

Novaj parolantoj estas tre bonvenaj kaj, se ili ne estas *eternaj komencantoj* (agrablaĵ *kielvifartuloj* aŭ drinkemaj *jeviasanuloj*), oni kore helpas ilin altigi sian lingvan nivelon. Ne malofte oni malkovras, ke hezitantaj parolanto – kiu eklernis Esperanton antaŭ nur du monatoj –, estas brillega homo. Post jaro, oni rimarkas, ke

tiu komencinto ja havas respondecon en la estraro de sia nacia esperanta asocio, kaj la sekvan jaron tiu homo jam elstare prelegas en la Universala Kongreso en perfekta Esperanto. Oni ne povas tiel fulmrapide grimpi en nacia socio.

Alia grava flanko estas la sindonemo: la plejparto el la instruistoj instruas senenspeze, la verkistoj ne sonĝas ricevi eĉ groŝon pro sia enorma laboro, la armeo de volontuloj, kiuj organizas kaj helpas en kongresoj kaj renkontiĝoj, estas multnombra kaj tiuj pacaj batalantoj malavare dediĉas sian tempon por ni ĉiuj. Kaj kion diri pri Pasporta Servo! Oni povas travojaĝi la tutan planedon sen kuŝi en hotelo. Mi memoras, ke esperanta familio el Prago ĉagreniĝis, ĉar mi mendis hotelĉambron en Prago anstataŭ gastis siahejme, kiam mi vizitis turismocele tiun belegan urbon kun mia familio.

Esperantujo ja estas kvazaŭ vilaĝo, sed mi timas, ke se ni ĉiuj vere loĝus en fizika vilaĝo lokata en konkreta mondopunkto, eble la afero ne tiel bonus. Eble ni ĉiuj montras nian plej bonan flankon en Esperantujo kaj malfacile ni povus agi tiel en la ĉiutaga vivo. Foje mi pensas, ke se la fina venko okazus, ni eklernos alian lingvon por konservi nian aferon tiel kiel ĝi estas.

Do, ni ĝuu Esperantujon kaj ni ankaŭ danku la homojn, kiuj sindoneme realigas tiun ĉi revuon, kie ni renkontiĝas lege de tempo al tempo. ■

PERADO

Un servei de KEA per accedir
a l'esperanto amb tota comoditat



Abonaments a revistes

Inscripció a trobades i congressos

Estalvia't transferències, comissions i maldecaps!
Més informació: perado@esperanto.cat